



D<sup>RO</sup> L. L. ZAMENHOF.

Fot. Pirou  
Boul. St. Germain, Paris.



EMANUEL REICHER aranĝas la unuan prezentadon de „**Ifigenio**“ en Esperanto por la 4a Internacia Esperantista Kongreso en Dresden (19a de Aŭgusto 1908) kaj ludas la rolon de TOAS.



HEDWIG REICHER ludas la rolon de IFIGENIO.



BRUNO DECARLI ludas la rolon de ORESTO.

IFIGENIO EN TAŬRIDO

Presejo de Möller & Borel G. m. b. H.  
Berlin S., Prinzenstrasse 95.



GOETHE

# IFIGENIO EN TAŬRIDO

Dramo en kvin aktoj

EL GERMANA LINGVO TRADUKIS

D<sup>ro</sup> L. L. ZAMENHOF

FRANCUJO

HACHETTE ET C<sup>IE</sup>

79, Boul. Saint-Germain

PARIS.

GERMANUJO

ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL

95, Prinzenstrasse

BERLIN.

1908.

Tous droits réservés.

*PERSONOJ:*

- IFIGENIO.
- TOAS, reĝo de la Taŭridanoj.
- ORESTO.
- PILADO.
- ARKAS.

Loko de agado: arbareto antaŭ la templo de Diano.

## **IFIGENIO EN TAŬRIDO.**

### **AKTO UNUA.**

#### **SCENO UNUA.**

IFIGENIO (sola).

Al via ombro, pintoj moviĝemaj  
De l' densa kaj antikva arbareto,  
Al la sankteĵ' kvietaj de l' diino  
Ankoraŭ nun kun trema sent' mi iras,  
Simile kiel la unuan fojon:  
Ne povas mi al vi alĉutimiĝi.  
Jam multajn jarojn min ĉi tie kaŝas  
Plej alta volo, kiun mi obeas;  
Mi tamen ĉiam sentas min nur fremda.  
Ĉar ve! transmarea estas miaj karaj!  
Mi longajn tagojn staras sur la bordo,  
Serĉante per la kor' la Grekan landon;  
Al miaj ĝemoj nur per surdaj tonoj  
Respondas la ondegoj de la maro.  
Ho ve al tiu, kiu devas vivi  
For de l' gepatroj kaj de la gefratoj!  
Malĝojo al li rabas la feliĉon;  
Forvagas flanken ĉiam liaj pensoj  
Al la gepatra domo, kie suno  
Al li aperis la unuan fojon,  
Kaj samdomanoj ĉiam pli kaj pli  
En ludo alligiĝis reciproke.  
La diojn mi ne juĝas; tamen vere  
Plendinda estas stato de virino.  
En domo kaj milit' la viro regas,  
En fremda land' li ankaŭ al si helpas;  
Li la posedon, li la venkon ĝuas,  
Eĉ lia morto estas morto glora.  
Sed la virinon ĉio ĉirkaŭbaras!  
Eĉ krudan edzon obeadi estas  
Por ŝi ne sole devo, sed

konsolo; Sed kiel mizerega ŝi fariĝas, Se en fremdlandon pelis ŝin la sorto! Ĉi tie Toas, nobla viro, tenas Min en katenoj sanktaj, tamen sklavaj. Kun honto mi konfesas, ke mi servas Al vi, diino, mia savintino, Nur kontraŭvole! Tamen mian vivon Al vi dediĉi devus mi libere! Al vi, Diano, ĉiam mi esperis, Ankoraŭ nun esperas mi senĉese. Vi min, filinon de plej granda reĝo, En vian sanktan aman brakon prenis, Por savi de la morto. Ho, diino, Se tiun grandan viron, kiun vi Turmentis, postulante la filinon, Kaj li al vi oferis la plej karan, — Se la Agamemnonon disimilan Vi de la Trojaj muroj disbatitaj Venigis gloire en patrujon lian, Se vi al li konservis la edzinon, 7 Elektron kaj la filon, la trezorojn: Vi ankaŭ min redonu al la miaj Kaj min, savinte de la morto, savu De l' ĉi-tiea vivo, dua morto!

## SCENO DUA.

IFIGENIO. ARKAS.

**ARKAS.**

Min sendas nia reĝo, li esprimas Saluton al pastrino de Diano. Hodiaŭ por mirindaj novaj venkoj Taŭrido dankas sian patroninon. Mi venas antaŭ reĝo kaj armeo Kun la raport', ke ili proksimiĝas.

**IFIGENIO.**

Akcepton decan ni al ili faros, Kaj la diin' atendas kun favoro La oferdonon el la man' de Toas.

**ARKAS.**

Se ankaŭ la rigardo de l' pastrino, De l' respektata sankta virgulino, Nun estus pli serena kaj pli luma, Ĝi estus bona signo por ni ĉiuj! Malĝoj' kaŝita tamen ĉiam kovras Mistere vian koron. Jam tre longe El via brusto vane ni atendas Vorteton de konfido. De l' momento, En kiu mi ĉi tie vin ekkonis, 8 Rigardo via ĉiam min tremigas; Kaj kvazaŭ enforĝita per feraĵo, Animo via kaŝas sin profunde.

**IFIGENIO.**

Mi estas ja orfino elpelita.

**ARKAS.**

Ĉu vi ĉi tie sentas vin tiele?

**IFIGENIO.**

Ĉu povas fremda land' fariĝi hejmo?

**ARKAS.**

Por vi la hejmo ja fariĝis fremda.

**IFIGENIO.**

Pro tio ĝuste sangas mia koro. En la komenco de l' juneco, kiam Apenaŭ la animo alligiĝis Al la gepatroj kaj al la gefratoj Kaj harmonie el malnova bazo Plantidoj novaj ĉarme kreskis supren, Ha, tiam min malben' ne miakaŭza Subite kaptis kaj min apartigis De la amatoj kaj per fera mano La ĉarman ligon ŝiris. Flugis for La ĝojo de l' juneco, la ĝuado De la unuaj jaroj. Eĉ savita, Mi estis jam nur ombro; la gajeco De l' viv' en mi neniam plu refloros.

9

**ARKAS.**

Se vi vin nomas tiel malfeliĉa, Mi povas ankaŭ nomi vin sendanka.

**IFIGENIO.**

Vi dankon ĉiam havas.

**ARKAS.**

Sed ne tiun Sinceran, kiu logas bonfaradon, Gajecon, kiu al la mastro montras Kontentan vivon kaj amantan koron. Memoru, kiam antaŭ multaj jaroj Mistera sort' alportis vin ĉi tien, Ho, tiam vin, donitan de la dioj, Renkontis Toas kun respekt' kaj amo; Amike vin akceptis tiu bordo, Pri kiu kun teruro ĉiam pensas Fremduloj, ĉar neniam antaŭ vi Fremdul' en nian regnon povis veni, Se li ne volis laŭ antikva moro Sur la ŝtuparo sankta de Diano Tuj fali kiel sanga oferdono.

**IFIGENIO.**

Libere spiri ne signifas vivi. Ĉu estas vivo, se sur unu loko, Kiel spirito ĉirkaŭ sia tombo, Mi devas nur funebri? Ĉu ĝi estas Natura, gaja kaj konscia vivo, Se ĉiu tago, vane trasonĝita, Preparas nin al tiuj grizaj tagoj, <sup>10</sup> El kiuj sur malgaja bord' de Leto Konsistas la estado de l' mortintoj? Sencela vivo estas frua morto; Jen estas mia plej virina sorto.

**ARKAS.**

Pardonas mi la noblan fierecon, Pro kiu al vi mem vi ne sufiĉas; Mi vin bedaŭras, ĉar la tutan ĝuon De l' viv' ĝi de vi rabas. Ĉu nenion De via veno vi ĉi



tie faris? Sed kiu do la reĝon serenigis? Kaj kiu per bonkora admonado Forigis la antikvan kruelaĵon, Ke ĉiu fremda devis sian vivon Sur la altaro de Diano perdi? Kaj la kaptitojn kiu tiel ofte De certa mort' resendis al patrujo? Kaj ĉu, anstataŭ flami per kolero Pro perdo de antikvaj oferdonoj, Diano ne aŭskultis vian preĝon? Kaj ĉu ne ĉirkaŭflugas la armeon La venko kaj eĉ antaŭ ĝi rapidas? Ĉu ne pli bonan sorton ĉiu sentas De l' temp' kiam la reĝo, ĉiam saĝa Kaj brava, nun sub via efikado Fariĝis ankaŭ mola, favorkora, Al ni faciligante nian devon De la silenta obeado? Tion Vi nomas senceleco, se de vi Sur milojn dolĉe gutas la balzamo? Se al popol', al kiu Di' vin donis,<sup>11</sup> Vi estas nova fonto de feliĉo Kaj donas sur la bordo de la morto Al la fremdulo savon kaj revenon?

**IFIGENIO.**

Malgranda faritaĵo malaperas Ĉe la rigardo, kiom fari restas.

**ARKAS.**

Ĉu decas tro malŝati siajn farojn?

**IFIGENIO.**

Malbone estas siajn farojn pesi.

**ARKAS.**

Fiere veran indon tro malŝati Aŭ pro valor' malvera tro sin laŭdi—Egale ambaŭ estas mallaŭdindaj. Ho, kredu vi al la parol' de viro Sindona kaj honesta: se hodiaŭ La reĝ' al vi parolos, faciligu Al li la taskon diri sian penson.

**IFIGENIO.**

Vi min maltrankviligas. Mi jam ofte De li proponon timis kaj evitis.

**ARKAS.**

Pripensu viajn agojn kaj profiton! De l' tempo, kiam li la filon perdis, La reĝo al malmultaj jam konfidas, Kaj eĉ al tiuj malpli ol antaŭe;<sup>12</sup> Suspekto nun en ĉiu nobelido Li vidas heredanton de la regno, Li timas senkonsolan maljunecon Kaj eble eĉ ribelon, fruan morton. La skitoj ne tre ŝatas paroladon, Des pli la reĝo. Li, kiu kutimis Nur agi kaj ordoni, li ne scias La arton aldirekti paroladon De malproksime lerte ĝis la celo. Al li la taskon ne malfaciligu Per retenigo aŭ eĉ per intenca Nekomprenado. Iru komplezeme Duonon de la voj' al li renkonte!

**IFIGENIO.**

Akceli tion, kio min minacas?

**ARKAS.**

Aspiron lian nomas vi minaco?

**IFIGENIO.**

Jes, ĝi por mi la plej terura estas.

**ARKAS.**

Por lia amikec' konfidon pagu!

**IFIGENIO.**

Se li min liberigos de la timo.

**ARKAS.**

Devenon vian antaŭ li ne kaŝu.

13

**IFIGENIO.**

Pastrino devas esti sekretema.

**ARKAS.**

Sekreto antaŭ reĝ' ne devas esti; Kaj kvankam li ne tuj postulas, tamen En sia granda koro li ĝin sentas, Ke vi tre zorge antaŭ li vin kaŝas.

**IFIGENIO.**

Ĉu havas li koleron kontraŭ mi?

**ARKAS.**

Mi ĝin supozas. Kvankam li silentas, Okazaj vortoj tamen al mi montris, Ke lia koro forte jam decidis Posedi vin. Mi petas vin, ne lasu Lin al si mem, por ke en lia koro Ne maturiĝu la koler', portante Al vi teruron, kiu tro malfrue Vin memorigus pri konsilo mia!

**IFIGENIO.**

Ho, ĉu la reĝ' intencas fari tion, Pri kio nobla homo, kiu amas La propran nomon kaj respektas diojn, Neniam devas pensi? Ĉu li volas Perforte min de la altaro tiri En sian liton? Tiam mi min turnos Kun voko al la dioj, kaj precipe Al ŝi, Diano energia, kiu Defendon sian certe ne rifuzos<sup>14</sup> Kiel diino al pastrino sia Kaj kiel virgulin' al virgulino.

**ARKAS.**

Ne timu! Nova sango malkvieta  
La reĝon ne instigos fari tian  
Junulan agon.  
Sed de li mi timas  
Alian nun decidon, kiun li  
Plenumos senkompate kaj  
severe,  
Ĉar li neniam ŝanĝas la decidojn.  
Mi tial petas, montru al li dankon,  
Se pli oferi vi al li ne povas.

**IFIGENIO.**

Ho, diru, diru, kion plu vi scias!

**ARKAS.**

Li diros mem. Mi vidas, ke li venas.  
Al vi ordonas via propra koro  
Akcepti lin amike kaj konfide.  
Kaj noblan viron bona vort' virina  
Kondukas malproksimen.

**IFIGENIO.**

Mi ne povas Plenumi la konsilon bondeziran,  
La konsciencon tamen mi obeos  
Kaj al la reĝ' por lia bonfarado  
Mi donos bonajn vortojn. Mi dezirus,  
Ke al la potencul' mi sen mensogo  
Esprimi povu, kio al li plaĉos.

15

SCENO TRIA.

IFIGENIO. TOAS.

**IFIGENIO.**

Per la plej belaj donoj kaj trezoroj  
Vin benu la diino! Al vi ĉiam  
Ŝi donu venkon, gloron kaj riĉecon,  
Bonstaton por la viaj kaj plenumon  
De ĉiu via nobla ekdeziro!  
Ke vi, kiu tre multajn zorge regas,  
Feliĉon ankaŭ multigitan havu!

**TOAS.**

Mi ĝojus, se min glorus la popolo,  
Ke tion, kion mi akiris, ĝuas  
Aliaj pli ol mi. La plej feliĉa—  
Ĉu reĝo, ĉu simplulo—estas homo,  
Se lin ĝojigas lia propra domo.  
Vi partoprenis en doloro mia  
La tagon, kiam glav' de malamiko  
De mia flanko rabis mian filon,  
La lastan, la plej bonan. Tiel longe,  
Dum mia koro estis okupita  
De la spirit' de venĝo, mi ne sentis  
La dezertecon do loĝejo mia;  
Sed nun kontentigita mi revenas,  
La malamikan regnon mi detruis  
Kaj mia filo estas jam venĝita,  
—Nun en la tuta mia domo restas  
Nenio, kio povus min ĝojigi.  
La gajan obeadon, kiu lumis<sup>16</sup>  
Por mi ĝis nun el la okul' de ĉiu,  
Nun ombras zorgo kaj nekontenteco.  
Jam ĉiu pensas pri la estonteco  
Kaj senfilulon sekvas

nevolonte. Mi venas nun en tiun templon, kiun Mi vizitadis ofte, por elpeti La venkon, aŭ por danki por la venko. En mia brusto portas mi deziron Malnovan, kiu certe por vi ankaŭ Ne estas nekonata: mi esperas, Ke por la beno al popolo mia Kaj al mi mem mi enkondukos vin En mian domon kiel fianĉinon.

**IFIGENIO.**

Ho reĝo! Al knabino nekonata Tro multe vi oferas. Hontigita Nun staras antaŭ vi la fremdulino, La elpelita, kiu sur la bordo Nenion serĉis krom rifuĝo paca, Kaj tion vi al mi sufiĉe donis.

**TOAS.**

Ke la devenon vian antaŭ mi Vi ĉiam kaŝas, reĝon ofendante,—Neniu gento povus ĝin toleri. Timigas nia bordo la fremdulojn: Postulas tion leĝ' kaj neceseco; Sed vi ja ĝuas ĉiujn leĝajn rajtojn, Vi, plej afable akceptita gasto, Laŭplaĉe disponanta sian tagon,—De vi konfidon mi esperis, kiun Meritas mastro por la gastameco.

17

**IFIGENIO.**

Se kaŝis mi la nomon de l' gepatroj, Ho, mia reĝo, kredu, mi ĝin faris Pro embaraso, ne pro malkonfido. Ĉar ve! tre povas esti, ke se vi Ekscius, kiu antaŭ vi troviĝas Kaj kian sorto malbenitan kapon Vi nutras kaj defendas, terurego Atakus tiam vian grandan koron; Anstataŭ sur la tronon min inviti, Vi eble min elpelus el la regno, Kaj antaŭ ol atingus mi revenon Al mia hejmo, finon de l' vagado, Vi puŝus min al la mizero, kiu Fariĝas ĉie la terura sorto De ĉiu elpelito kaj vaganto.

**TOAS.**

Nu, kiel ajn pri vi la dioj pensas Kaj kion ajn pri via dom' decidis,—Mi tamen scias, ke de l' tempo, kiam Ĉi tie vi aperis kaj ĉe ni Vi ĝuas plenmezure gastamecon, Ne mankas al ni beno de l' ĉielo. Ne estus tre facile min konvinki, Ke mi en vi protektas kulpan kapon.

**IFIGENIO.**

Vin benas la bonfaro, ne la gasto.

**TOAS.**

Boneco por krimul' ne donas benon; <sup>18</sup>Ĉesigu do silenton kaj malfidon! Ne maljustulo tion ĉi postulas. Al mi vin la diino enmanigis, Kaj kiel ŝi, mi ankaŭ vin protektas, Kaj ŝia volo estu por mi leĝo: Se povas vi reveni en la hejmon, Mi

tiam vin de ĉio liberigas; Sed se la vojo estas jam barita Al vi por ĉiam, aŭ se  
via gento El sia lando estas elpelita Aŭ eĉ fatale tute estingita, Vi tiam ĉiurajte  
estas mia. Parolu do malkaŝe, kaj vi scias, Ke mi neniam rompas mian vorton.

**IFIGENIO.**

De la ligil' malnova nevolonte La lango liberiĝas, por nun fine Malkaŝi, kion  
kaŝis mi tre longe; Ĉar se sekreton oni unu fojon Al iu elkonfidas, ĝi forlasas Por  
ĉiam la gardejon en la koro Kaj malutilas, aŭ ĝi iufoje Utilas, se la dioj tion  
volas. Aŭskultu! Mi devenas de Tantalo.

**TOAS.**

Kviete vi eldiris grandan vorton! Ĉu tiu estas via gentopatro, Pri kiu aŭdis ja la  
tuta mondo, Ke estis li plej granda favorato De la diaro? Ĉu li estas  
tiu<sup>19</sup> Tantalo, kiun Jupiter' invitis Al sia tablo kaj al konsiliĝo Kaj kies spertoriĉajn  
saĝajn vortojn La dioj mem kun ĝuo aŭskultadis, Simile al parol' de orakolo?

**IFIGENIO.**

Li estas tiu sama. Sed la dioj Ne devas tro kun homoj amikiĝi: Ĉar mortemuloj  
estas tro malfortaj, Por sen kaptuno teni sin tro alte. Ne estis li malnobla  
perfidulo, Sed nur tro granda, por sin senti sklavo, Kaj tro malgranda por kunul'  
de dio, Kaj lia peko estis ja nur homa. Severa estis la dekret' de l' dioj, Kaj la  
poetoj kantas, ke perfido Kaj granda fiereco lin por ĉiam Do l' tablo Jupitera  
defaligis Kun granda malhonor' en la Tartaron. Kaj ve! la tuta gento sur si  
portas Eterne la koleron de la dioj.

**TOAS.**

Ĉu pro l' prapatro aŭ de propra kulpo?

**IFIGENIO.**

Ĝi estas vero, ke la tuta gento La malkvietan forton de l' Titanoj Heredis certe;  
tamen Jupitero Per fer' ilian frunton ĉirkaŭforĝis; Saĝecon, moderecon,  
paciencon<sup>20</sup> Ne konis ili; ĉiu ekdezire Ĉe ili tuj fariĝis furiozo Sovaĝa kaj  
senlima. Jam Pelopso La viro kun la fera vol', la filo Amata de Tantal' al si  
akiris Per trompo kaj perfido la plej belan Virinon en la mond',  
Hipodamion, Filinon de la reĝo Ojnomaos. Du filojn ŝi al sia edzo naskis, Tieston  
kaj Atreon. Kun envio La amon de la patro ili vidis Al la unua filo, kiu restis De la  
edzin' unua. La malamo La fratojn interligis, kaj sekrete Mortigis ili kune sian  
fraton. La patr' Hipodamion tuj suspektas, Kaj furioze li de ŝi postulas Redonon  
de la fil', kaj ŝi mortigas Sin mem....

**TOAS.**

Vi eksilentis? Ho, daŭrigu! Ne pentu, ke konfidis vi. Parolu!

**IFIGENIO.**

Feliĉa estas, kiu kun plezuro Parolas pri la patroj, kiu ĝoje Rakontas pri iliaj grandaj agoj Kaj en la fino de la bela vico Sin mem fiere vidas. Ne naskiĝas En ia dom' subite duondio Aŭ monstro; sed nur tuta granda vico<sup>21</sup> Da malbonuloj aŭ bonuloj kreas Monstraĵon aŭ gloraĵon en la mondo. Post morto de la patro regis kune Atreo kaj Tiesto en la urbo. Ne longe tamen povis daŭri paco. Post kelka temp' Tiesto malhonoris La liton de la frato. Tiam venĝe Atreo lin elpelis el la regno. Sed jam de longe, krimon preparante, Tiesto ŝtelis filon de Atreo Kaj lin edukis kvazaŭ sian propran. Nun en la brusto de la kvazaŭfilo Li vekas furiozan venĝemecon Kaj lin elsendas al la reĝa urbo, Por en la onklo buĉi sian patron. La plano de l' junulo malkovriĝas; Kaj per kruela morto nun la reĝo La atencinton punas, supozante, Ke li mortigas filon de la frato. Nur tro malfrue li sciiĝas, kiu En turmentego antaŭ li pereis. Por kontentigi brulan deziregon De venĝo, li sekrete primeditas Teruran faron. Ŝajne pacigita, Indiferenta kaj trankvila, logis Li sian fraton kun du liaj filoj Returne en la regnon; ambaŭ knabojn Li kaptas kaj buĉigas; ĉe festeno Regalas li la patron per viando De liaj propraj filoj. Kiam poste Tiesto, satiĝinte, eksopiras Pri siaj filoj kaj demandon faras<sup>22</sup> Kaj pensas jam, ke post la pord' li aŭdas Liajn paŝojn kaj ilian voĉon, Atreo kun sovaĝa rido ĵetas Nun antaŭ lin la kapojn de l' buĉitoj ... Vi, reĝo, kun teruro vin deturnas! La suno ankaŭ tiel sin deturnis Kaj fordirektis tiam sian ĉaron ... Jen la prapatroj de l' pastrino via! Kaj multon el la sorto de la viroj Kaj el iliaj agoj furiozaj Ankoraŭ kovras la malluma nokto, Montrante nur krepuskon tremigantan.

**TOAS.**

Vi ankaŭ ilin kovru per silento! Sufiĉe da teruroj! Vi nur diru, Per kia do miraklo vi elkreskis El tiu trunk' sovaĝa?

**IFIGENIO.**

De Atreo Unua fil' Agamemnono estis: Li estas mia patro. Sed en li Mi ĉiam vidis—mi kun ĝojo diras—Modelon de la plej perfekta viro. Al li kiel unuan amofrukton Min naskis Klitemnestro, kaj post mi Elektron. Kaj la reĝo regis pace, Kaj la ripozon longe ne havitan Ricevis nun la domo de Tantalo. Por la feliĉo de l' gepatroj mankis Ankoraŭ filo; sed apenaŭ tiu<sup>23</sup> Deziro plenumiĝis kaj intere De la fratinoj kreskis la fileto, Oresto la amata, jen pretiĝis Jam nova malfeliĉo por la domo. Vi aŭdis ja pri la milito, kiu, Por venĝi rabon de virin' plej

bela, La tutan forton de la grekaj princoj Venigis sub la grandan urbon Trojo. Ĉu ili Trojon venkis kaj la celon De sia venĝ' atingis, — mi ne aŭdis. La tutan armearon de la grekoj Kondukis mia patro. En Aŭlido Atendis ili longe tute vane Favoran venton, ĉar Dian' koleris Ilia kondukanton, ŝi retenis La rapidantajn grekojn kaj postulis Per Kalĥas la filinon la plej aĝan De l' reĝo. Tiam ili ruze logis Min kune kun patrin' en la tendaron, Al la altar' min tiris kaj oferis Ĉi tiun kapon al Diano. Tiam Ŝi repaciĝis: ŝi ne volis havi La sangon mian, ŝi min save kovris Per nubo. Kaj nur en ĉi tiu templo Post ŝajna morto mi min mem rekonis. Ĝi estas mi, mi mem: Ifigenio, Nepino de Atreo kaj filino De l' reĝ' Agamemnono, la propraĵo De la diino, antaŭ vi nun staras.

**TOAS.**

Ne pli por mi valoras reĝidino, <sup>24</sup>Ol la ĝisnuna nekonatulinino. Senŝanĝe mi ripetas: vi min sekvu, Kun mi dividu, kion mi posedas!

**IFIGENIO.**

Ho, kiel mi kuraĝus tion fari? Ĉu mi ne apartenas tute plene Al la diino, kiu mem min savis? La rifuĝejon ŝi por mi elektis, Kaj por la patro, kiun per la ŝajno Ŝi jam sufiĉe punis, ŝi konservas Min eble kiel la plej belan ĝojon Por lia maljuneco. Eble jam La tago de l' reveno proksimiĝas, Kaj mi, intencon ŝian malŝatante, Min mem katenus kontraŭ ŝia volo? Ŝi donu signon, se mi devas resti.

**TOAS.**

Ŝi vin retenas, sekve ŝi konsentas. Ne serĉu tiel zorge la pretekstojn! Ne kaŝas multaj vortoj la rifuzon; La aŭskultanto aŭdas nur la „ne“.

**IFIGENIO.**

Ne volas mi per vortoj vin blindigi; La koron mian mi al vi malkovris. Kaj ĉu vi mem ne sentas, kiel min La sopirado devas forte tiri Al mia patro, al patrino mia, Al la gefratoj, por ke en la domo, En kiu la malĝojo tiel ofte <sup>25</sup>Ankoraŭ murmuretas mian nomon, Eksonu unu fojon ĝoja krio Pri mi kiel pri novenaskitino Kaj floroj gaje kronu la kolonojn? Ho, se vi tien ŝipe min resendus, Vi al ni ĉiuj donus novan vivon.

**TOAS.**

Nu, do reiru! Faru, kion diktas Al vi la koro, ne obeu voĉon De la prudento kaj konsilo! Estu Virino tute, donu vin libere Al la instinkto, kiu vin senbride Sovaĝe pelas tien ĉi kaj tien! Se en la brusto de virin' ekflamas Deziro, tiam eĉ ligil' plej sankta Ŝin ne detenas de l' trompanto, kiu Ellogas ŝin el la fidelaj brakoj De l'

patro aŭ de la sindona edzo; Sed se ne brulas flam' en ŝia brusto, Ho, tiam vane kontraŭ ŝi laboras La ora lango de la admonado.

**IFIGENIO.**

Memoru, reĝo, vian noblan vorton! Ĉu tiel vi repagas por konfido? Vi ŝajnis pretigita ĉion aŭdi.

**TOAS.**

Mi por surpriz' ne estis pretigita; Sed ankaŭ tion devis mi atendi: Mi sciis ja, ke kun virin' mi traktas.

26

**IFIGENIO.**

Ho, ne insultu, reĝo, nian sekson! La bataliloj de virin' ne estas Brilantaj kiel viaj, sed malnoblaj Ne estas ili certe. KREDU, reĝo, Ke mi komprenas la feliĉon vian Pli bone ol vi mem. Ĉar vi ne konas Vin mem nek min, vi tial opinias, Ke ligo pli proksima al ni donus Feliĉon. Tute plena de kuraĝo Kaj de plej bona volo, vi postulas, Ke mi nun cedu; tamen plej sincere La diojn dankas mi, ke ili donis Al mi la forton, por kontraŭbatali La ligon, kiun ili ne aprobas.

**TOAS.**

Ne dioj, sed nur via kor' parolas.

**IFIGENIO.**

Per nia kor' parolas al ni ili.

**TOAS.**

Kaj mi ne havas rajton ilin aŭdi?

**IFIGENIO.**

Tra la venteg' la voĉo ne aŭdiĝas.

**TOAS.**

Ĉu la pastrino sola ĝin nur aŭdas?

**IFIGENIO.**

Ĝin reĝo pli ol ĉiuj devus aŭdi!

27



**TOAS.**

Ofico sankta kaj hereda rajto  
De l' Jupitera tablo proksimigas  
Vin al la dioj pli ol  
min, barbaron, Infanon de la tero.

**IFIGENIO.**

Tiel punas  
Vi min por la konfido ellogita!

**TOAS.**

Mi estas hom'; pli bone do ni finu!  
La vorto mia restu: estu plue  
Pastrino de l' diin' laŭ ŝia volo;  
Sed mi pardonon petas de Diano,  
Ke mi ĝis nun maljuste ŝin  
senigis  
De la antikvaj decaj oferdonoj.  
Neniun fremdan prenas nia lando;  
Laŭ mor' antikva lin atendas morto;  
Nur vi per via ĉarma afableco,  
En kiu mi per mia koro vidis  
Jen amon do filino, jen la senton  
De silentanta ĉarma fianĉino,—  
Nur vi per sorĉa ligo min katenis,  
Ke mi forgesis tute mian devon.  
Vi mian cerbon kvazaŭ endormigis,  
Kaj mi ne aŭdis pli la murmuradon  
De la popol'. Nun ĉiuj laŭte krias,  
Ke la frutempa mort' de mia filo  
Pro mia kulpo venis. Mi ne volas  
Nun plu pro vi retenigi la amason,  
Kriantan laŭte pri la oferdonoj.

28

**IFIGENIO.**

Pro mi neniam tion mi deziris.  
La diojn ne komprenas, kiu pensas,  
Ke ili amas sangon; li enmetas  
En ilin sian propran kruelecon.  
Ĉu min ne savis la diino mem?  
Ŝi mian servon volis, ne la morton.

**TOAS.**

Ne decas por facilmovebla saĝo  
Laŭ nia propra vol' komentarii  
La sanktan tradicion. Vi plenumu  
La devon vian, mi plenumos mian.  
Du fremdaj viroj, kiujn ĵus ni trovis  
Kaŝitajn en surbordaj la kavernoj  
Kaj kiuj ne alportas al ni bonon,  
En miaj manoj estas nun. En ili  
Diino via havu nun denove  
La longe jam mankantajn oferdonojn!  
Mi ilin sendos; vi la servon konas.

SCENO KVARA.

IFIGENIO (sola).

Vi havas nubojn, ho savantino,  
Por kovri senkulpajn persekutatojn  
Kaj per la vento ilin forporti  
De la fera kruela fatalo,  
Trans la maron, trans multajn landojn  
Ilin forporti, kien vi volas.  
Vi estas saĝa, la estontaĵon  
Kaj la pasintaĵon

vi konas precize;<sup>29</sup>Via rigardo gardas la viajn,Kiel via lumo, la vivo de l'  
noktoj,Gardas kaj regas tutan la teron.Miajn manojn detenu de sango!Benon  
kaj pacon neniam ĝi donas;Kaj la fantomo de mortigitoEn horoj malĝojaj de la  
mortigintoLin atakas kaj lin turmentas.Ĉar la senmortuloj amas la homojn,La  
bonajn gentojn kaj generaciojn,Kaj ili volonte longigas la vivonDe mortemulo,  
kaj ili volonteAl li ebligas ĝui kelktempeKune kun ili la ĝojan vidonDe propra  
ilia eterna ĉielo.

30

## **AKTO DUA.**

SCENO UNUA.

ORESTO. PILADO.

**ORESTO.**

Ni iras nun la vojon de la morto:Animo mia grade trankviliĝas.Mi Apolonon  
petis, li foriguDe mia flanko la teruran bandonDe l' venĝfantomoj, kaj en liaj  
vortojMisteraj tiam sentis mi promeson,Ke trovos mi la helpon kaj la savonEn  
la sanktejo de fratino lia,La regantino de la Taŭridanoj.Ĝi plenumiĝas: tuta la  
mizeroFiniĝos nun kun mia vivo kune!Al mi, al kiu dia mano premasLa koron  
kaj surdigas la spiriton,Ja estas tiel ĝoje kaj facileAdiaŭ diri al la lum' de l'  
suno!Kaj se ne devas nepoj de AtreoKun kron' de venko fali en batalo,Se mi,  
simile al prapatroj miaj,Perei devas kiel oferbesto:Ĝi plenumiĝu! Estas ja pli  
boneĈi tie morti antaŭ la altaro,OI en angulo malbenita, kie<sup>31</sup>Mortigus nin  
parenco-insidanto.Ho, lasu min almenaŭ nun ripozi,Vi, subteruloj, tiel  
avidantajLa sangon, kiu ĉiun mian paŝonGutante signas! Lasu min ripozi,Jam  
baldaŭ mi malsupren al vi venos.Nek min, nek vin la lum' de l' tago vidu,Kaj la  
tapiŝo verda de la teroNe estu plu svarmejo por fantomoj.Mi venos al vi tien  
sub la teron,Kaj tie en senviva surda noktoEgala sorto ĉiujn unuigos.Nur vin,  
Pilad', senkulpa kamaradoDe mia nigra sorto kaj malbeno,Ho, kiel malvolonte  
mi kunprenasEn la funebran landon antaŭtempe!Nur via vivo, via morto  
kaŭzasAl mi ankoraŭ timon aŭ esperon.

**PILADO.**

Ne iras mi ankoraŭ kiel vi  
Pasive en la regiono de la ombroj. Tra la vojetoj  
konfuzitaj, kiuj  
Konduki ŝajnas al la nigra nokto, Mi penas nin traŝovi al la  
vivo. Pri morto mi ne pensas; mi meditas  
Ĉu eble iel helpas nin la dioj  
Rimedo  
n trovi por forkuro. La morto—ĉu vi timas aŭ ne timas—Ja venos mem. Eĉ  
kiam la pastrino  
Jam levos sian manon, por detranĉi  
Al ni oferedediĉe niajn  
buklojn,<sup>32</sup> Eĉ tiam via savo kaj la mia  
Ne ĉesos esti mia sola penso. Forĵetu la  
malĝojon, ĉar per dubo  
Akcelas ni danĝeron. Apolono  
Al ni promesis, ke en la  
sanktejo  
De la fratin' atendas nin konsolo  
Kaj helpo kaj reveno. Kaj  
dusencaj  
Neniam estas vortoj de la dioj, Kiel tre ofte pensas la prematoj.

**ORESTO.**

Al la malĝoj' de l' vivo la patrino  
En infanec' min jam al kutimigis, Kaj mi tiele  
kreskis, viva bildo  
De mia patro, kaj la senparola  
Rigardo mia ĉiam estis  
akra  
Riproĉ' por ŝi kaj ŝia adultulo. Tre ofte, kiam la fratin' Elektro  
En la profunda  
parto de la ĉambro  
Silente sidis antaŭ la kameno, Mi min al ŝia brusto time  
prem  
Kaj per okuloj grandaj kaj malĝojaj  
Rigardis ŝin, plorantan dolorege! Kaj  
tiam ŝi pri nia granda patro  
Parolis multe. Kiel mi deziris  
Lin tiam vidi, esti apud  
li! Jen mi deziris flugi for al Trojo, Jen mi deziris, ke al mi li venu ... La tago venis  
...

**PILADO.**

Nu, pri tiu horo  
Babilu inferuloj en la nokto!<sup>33</sup> Nin rememoro pri pli bela  
tempo  
Fortigu freŝe per heroaj faroj! La dioj ja bezonas bonajn homojn  
Por siaj  
planoj sur ĉi tiu tero; Sendube vin ankoraŭ task' atendas; Vin ili ja ne sendis  
kun la patro  
Ĉe lia ir' malvola al la Orko.

**ORESTO.**

Ho, se mi lian baskon tiam kaptus  
Kaj sekvus lin!

**PILADO.**

Nu, tiuj, kiuj vin  
Konservis, ili zorgis ja pri mi; Ĉar kio mi sen vi fariĝus, tion  
Mi eĉ  
prezenti ja al mi ne povas, Ĉar de la temp' de mia infaneco  
Ja nur kun vi kaj nur  
por vi mi vivas  
Kaj volas vivi.

**ORESTO.**

Ne rememorigu  
Al mi la belajn tagojn, kiam dolĉe  
En via dom' mi trovis  
rifuĝejon  
Kaj via nobla patro tiel ame  
Pri la duonmortinta floro zorgis, Kaj vi,  
senĉese gaja, ĉiutage  
Saltadis ĉirkaŭ mi kun nova vivo, Simile al la hela  
papilio  
Ĉirkaŭe de mallumkolora floro, Kaj la gajecon vian enverŝadis  
En mian

koron, kaj mi eĉ forgesis<sup>34</sup>Mizeron mian, kaj en viglaj revojJunecon mian mi kun vi pasigis.

**PILADO.**

Vin ekaminte, mi komencis vivi.

**ORESTO.**

Ne vivi, sed suferi vi komencis. Jes, tio estas la esenc' teruraDe mia sorto, ke kvazaŭ pestuloDoloron mi kaj morton en mi portas;Ke se mi nur ektuŝas ian lokon.Eĉ la plej sanan, baldaŭ ĉirkaŭ miSur la vizaĝoj eĉ la plej florientajAperas trajtoj de rampanta morto.

**PILADO.**

Mi certe la unua devus morti,Se via spir' en si venenon portus.Kaj tamen diru mem, ĉu mi ne estasAnkoraŭ plena de kuraĝ' kaj ĝojo?Kaj amo kaj kuraĝo nin kondukasAl grandaj faroj.

**ORESTO.**

Grandaj faroj? Jes,Ni ilin iam vidis antaŭ ni!En tiu tempo, kiam ni, ĉasante,Kuradis tra la valoj kaj la montoj,Kaj similante per la brust' kaj pugnoLa grandan nian gentopatron, niEsperis, ke ni tiel persekutos<sup>35</sup>Kun glav' kaj bastonego ian monstronAŭ bandon da rabistoj; kiam niVespere sidis ĉe la granda maro,Nin apogante unu al alia,Kaj antaŭ ni la ondoj dolĉe ludisKaj vasta staris antaŭ ni la mondo:Ho, tiam certe ofte ni kaptadisLa glavon, kaj estontaj faroj svarmisĈirkaŭe, kiel steloj en la nokto.

**PILADO.**

Sen lim' estas la faro, kiun volusPlenumi la animo. Ĉiun agonNi volus fari tuj tiele grandeLaŭ la amplekso, kiun ĝi atingas,Se multajn jarojn, tra generaciojKaj landoj, ĝin la buŝo de l' poetojPligrandigante rulas. Bele sonasLa agoj de l' prapatroj, kiam ilin,En la vespera ombro ripozante,Junulo sorbas kun la ton' de harpo;Sed kiel niaj faroj, tiel ankaŭIliaj ne prezentis perfektaĵon.Ni pelas ion, kio antaŭ niRapide kuras, kaj ni ne atentisLa vojon, kiun iras niaj paŝoj.La paŝojn de l' prapatroj kaj la signojnDe la surtera viv' ilia preskaŭNi ne rimarkas, ĉiam ni nur celasIliajn ombron, kiu disimileTre malproksime sidas kvazaŭ kronoTre alte sur la pintoj de la montoj.<sup>36</sup>Mi ne tre ŝatas tiujn, kiuj celasNur gloron inter la popol' akiri;Sed vi, junulo, vi la diojn danku,Ke ili tiel frue tiel multePer vi jam faris.

**ORESTO.**

Se al iu homoLa dioj donis la ĝojigan sortonForigi malfeliĉon de la  
siaj,Grandigi sian regnon, fortikigiLa limojn, aŭ malnovajn malamikojnFaligi aŭ  
forpeli,—tiam liLa diojn danku, ĉar al li la diojPlej grandan ĝojon en la vivo  
donis;Sed min la dioj faris ja buĉisto,Devigis min mortigi mian  
propranPatrinon, kiun tamen mi adoris;Kaj venĝe por la ago malhonoraMin  
abomene ili ruinigis.La domon de Tantalo ili juĝas,Kaj mi, la lasta el la dom',  
ne devasRicevi morton pian aŭ honoran.

**PILADO.**

Neniam pro la krimoj de la patrojLa dioj faras venĝon sur la filo;Ĉu bona, ĉu  
malbona—ĉiu memPor sia far' ricevas rekompenco.Nur beno herediĝas, ne  
malbeno.

**ORESTO.**

Ne beno ja kondukis nin ĉi tien.

37

**PILADO.**

Sed la decido de la altaj dioj.

**ORESTO.**

Ilia do decido nin mortigas.

**PILADO.**

Plenumu la ordonon kaj atendu!Se la fratinon vi al ApolonoAlportos kaj se  
ambaŭ kune loĝosEn Delfoj, sub konstanta adoradoDe nobla gento, tiam por  
ĉi tioLa alta paro certe vin favorosKaj savos vin de la inferulinoj.Jam en ĉi tiu  
sankta arbaretoJa ne kuraĝas ili ekaperi.

**ORESTO.**

Almenaŭ morton havos mi trankvilan.

**PILADO.**

Sed mi alie pensas. Mi kunligisLa pasintaĵon kun la estontaĵoKaj ne mallerte  
solvis la misteron.Tre povas esti, ke jam antaŭ longeLa dioj pri la granda far'  
decidis.Diano certe volas forsaviĝiDe la sovaĝa bordo de l' barbarojKaj de iliaj  
sangaj homoferoj;Ni estas elektitaj, por plenumiLa belan faron, kaj jam nun  
mirindeNi estas devigitaj tion fari.

38

**ORESTO.**

Vi lerte interplektas la decidojn De l' dioj kun la propraj viaj voloĵ.

**PILADO.**

Nu, kion do valoras homa saĝo, Se ĝi ne penas lerte trapenetri La volon de la dioj? Pezan ŝarĝon Surmetas dioj sur la noblan homon, Se li tro multe pekis, kaj por li Destinias ili taskon, kiu ŝajnas Al simplaj homoj tute ne solvebla. Sed la heroo venkas, kaj pentfare Li faras tiajn servojn, ke la mondo Estonte lin adoras.

**ORESTO.**

Se la sorto Al mi destinis vivi kaj agadi, Ho, tiam iu dio liberigu La frunton mian de l' kapturino, kiu Sur glita, patrinsange makulita Voĵeto min al la mortintoj tiras; Kompate li sekigu tiun fonton, Per kiu el la vundoj de l' patrino Konstante sur min ŝprucas la malbeno!

**PILADO.**

Atendu pli trankvile! La malbonon Vi mem ja pligrandigas kaj vi prenas Sur vin de la furioj la oficon. Min lasu primediti, vi silentu! <sup>39</sup>Nur poste, bezonante por la ago La fortojn kunigitajn, mi vin vokos, Kaj kun kuraĝ' prudenta tiam ambaŭ Alpaŝos ni al la efektivigo.

**ORESTO.**

Parolo de Uliso.

**PILADO.**

Vi ne moku! Jes, ĉiu devas mem al si elekti Heroon imitotan, se li volas Atingi la Olimpon. Mi konfesas, Ne pensas mi, ke ruĵo kaj prudento Makulas viron, kiu sin dediĉis Al plenumado de kuraĝaj faroj.

**ORESTO.**

Mi ŝatas nur kuraĝon rektaniman.

**PILADO.**

Ne petis tial mi de vi konsilon. Jam unu paŝon faris mi. Jam multe Da scioj mi ellogis de l' gardistoj. Mi scias jam, ke fremda, disimila Virin' katenas tiun sangan leĝon; Nur puran koron, preĝon, odorfumon Al dioj ŝi oferas. Ŝian koron Tre multe oni laŭdas; oni pensas, Ke ŝi devenas de amazoninoj, <sup>40</sup>Ke ŝi forkuris, por ke ŝi per tio Evitu ian grandan malfeliĉon.

**ORESTO.**

Videble nun potenco ŝia luma  
La forton perdis pro la proksimeco  
De la krimulo,  
kiun la malbeno Ĉirkaŭas, kiel vasta nigra nokto.  
La pia sangavido liberigas  
De la katenoj la antikvan moron,  
Por nin nun pereigi. La sovaĝa Spirito de la reĝo  
nin mortigos;  
Se li koleras, tiam nin virino  
Ne povas savi.

**PILADO.**

Bone al ni estas,  
Ke de virin' dependas nia sorto!  
Ĉar viro, eĉ plej bona,  
kutimigas Spiriton sian al la krueleco,  
Kaj fine li eĉ leĝon al si faras  
El tio, kion mem li abomenas,  
Kaj la kutimo faras lin malmola  
Kaj eĉ nerekonebla. Sed virino  
Obstine ĉiam sekvas sian senton,  
Kaj en la bono kaj en la malbono  
Ŝi estas pli fidebla ... Ts! ŝi venas!  
Nin lasu solaj! Mi ne devas tuj  
Eldiri niajn nomojn aŭ konfidi  
Al ŝi tro nesingarde nian sorton.  
Foriru! Antaŭ ol ŝi ekdeziros  
Kun vi paroli, mi kun vi parolos.

41

SCENO DUA.

IFIGENIO. PILADO.

**IFIGENIO.**

Fremdulo, diru, kiu kaj el kie  
Vi estas. Mi vin trovas pli simila  
Al greko, ol al skito.  
(Ŝi deprenas liajn ĉenojn.)  
Tre danĝera La libereco estas, kiun mi  
Nun al vi donas; ho, la bonaj dioj  
Deturnu tion, kio vin minacas!

**PILADO.**

Ho, dolĉa voĉo! Agrablega sono  
De l' hejma lingvo en la fremda lando!  
La bluajn montojn de l' haven' patruja  
Mi, la kaptito, vidas nun denove  
Kun ĝojo antaŭ la okuloj miaj.  
Ho jes, ho jes, mi ankaŭ estas greko!  
Mi por momento tute ja forgesis,  
Kiome mi bezonas vin, mi glutis  
Per la okul' ĉielan la aperon.  
Ho, se decido de pli alta forto  
Ne ŝlosas vian buŝon, diru, diru,  
El kiu el la grekaj niaj gentoj  
Vi, dia ido, havas la devenon.

**IFIGENIO.**

Pastrino, kiun la diino mem  
Por si elektis kaj al si dediĉis,  
Parolas nun kun vi; ĉi tio devas  
Al vi sufiĉi. Diru al mi, kiu  
Vi estas, kia sorto malfeliĉa  
Kun la kunul' vin tion ĉi venigis.

**PILADO.**

Facile mi rakonti al vi povasLa sorton, kiu pelas nin kruele.Ho, se kun tia sama facilecoVi povus nin ĝojigi per espero!El Kret' ni estas, filoj de Adrasto:Mi, la plej juna, nomas min Kefalo,Li, la plej aĝa, estas Laodamas.Kaj meze inter ni ankoraŭ estisAlia frato, kruda kaj sovaĝa,Kaj tiu jam en la infanaj ludojNe lasis al ni pacon kaj konsenton.Dum nia patro antaŭ Troj' batalis,Kviete ni sekvadis la patrinon;Sed kiam li kun riĉa hav' revenisKaj baldaŭ poste mortis, la disputoPri regno kaj heredo tuj disigisLa fratojn. Mi min tenis sur la flankoDe la plej aĝa. Tiu ĉi mortigisLa fraton. Kaj pro tiu sanga krimoLin la furioj pelas senripoze.Sed al ĉi tiu senkultura bordoNin sendis Apolono kun espero.En la sanktejo de l' fratino siaOrdonis li al ni atendi helpon.Nin oni kaptis kaj al vi venigisPor oferfaro. Tion vi jam scias.

43

**IFIGENIO.**

Ĉu Trojo falis? Ho, karul', certigu!

**PILADO.**

Ĝi falis, jes. Kaj vi al ni certiguLa savon! Rapidigu vi la helpon,De l' dio promesitan! EkkompatuVi mian fraton! Diru al li baldaŭBonkoran vorton! Tamen parolanteKun li, vi lin indulgu, mi vin petas;Ĉar ĝojo kaj dolor' kaj rememoroFacile lian tutan internaĵonEkskuas tro danĝere; tiam baldaŭFrenezo febroforma lin atakas,Animo lia bela kaj liberaFariĝas tiam havo de l' furioj.

**IFIGENIO.**

Kiome ajn vi estas malfeliĉa,Mi vin petegas, ĉion vi forgesu,Ĝis vi sopiron mian kontentigos.

**PILADO.**

La alta urbo, kiu tra dek jarojLa tutan grekan forton kontraŭstaris,Prezentas nun ruinojn, kaj neniamĜi releviĝos. Tamen multaj tombojDe la plej bonaj grekoj nin devigasMemori tiun bordon de l' barbaroj.Aĥilo falis, kaj amiko lia ...

**IFIGENIO.**

Ho, diaj bildoj, vi fariĝis polvo!

44

**PILADO.**

Kaj Palamed', Telamonid' AjaksoJam la patrujan sunon ne revidis.



**IFIGENIO** (*al si mem*).

Pri mia patro li nenion dirasKaj lin ne nomas inter la falintoj.Ho jes! li vivas!  
Jes, mi lin revidos!Ho, mia kor', esperu, mia koro!

**PILADO.**

Feliĉaj tamen estas tiuj miloj,Kiuj la morton trovis en batalo!Ĉar por la  
revenintoj dia manoPreparis ne triumfon, sed teruronKaj tre malĝojan finon.  
Ĉu la voĉoDe l' homoj ne atingas vin? Ĉar kienĜi nur atingi povas, ĝi  
disportasLa famon pri l' fariĝoj plej teruraj.Ĉu la mizero do, kiu plenigasPer  
ĝemoj ne ĉesantaj la palaconMikenan, al vi estas nekonata?Kun helpo de  
Egisto tre perfideMortigis Klitemnestro sian edzonTuj en la tago, kiam li  
revenis!...Ha, vi adoras tiun reĝan domon!Mi vidas, via brusto vane  
penasImpreson la teruran en si kaŝi.Ĉu estas vi filino de amiko?Ĉu vi naskiĝis  
en najbara urbo?Ne kaŝu, ne koleru, ke l' unuaTeruron tiun mi al vi raportas.

45

**IFIGENIO.**

Ho diru, ho rakontu la detalojnDe la terura faro!

**PILADO.**

En la tagoDe la reveno, kiam, sin baninte,La reĝo volis preni sian  
vestonKonfide el la manoj de l' edzino,La krimulino tiam sur lin ĵetisTeksaĵon  
faldoriĉan kaj implikan;Kaj dum li vane penis el la retoSin liberigi, perfidul'  
EgistoMortigis lin, kaj tiu granda princoKovrita iris al la malvivuloj.

**IFIGENIO.**

Kaj kian pagon la kunul' ricevis?

**PILADO.**

Kun regno liton, kion li jam havis.

**IFIGENIO.**

Volupto do ŝin pelis al la krimo?

**PILADO.**

Kaj forta sento de malnova venĝo.

**IFIGENIO.**

Per kio do la reĝo ŝin ofendis?

46

**PILADO.**

Per peza faro, kiu ŝin pravigus, Se nur mortigo estus pravigebla. Li al Aŭlido logis ŝin, kaj kiam Diino per kontraŭblovantaj ventoj Malhelpis forveturon de la grekoj, Li tiam senkompate sian propran Filinon la plej aĝan alkondukis Al la altaro de Dian', kaj ŝin Pro bon' de l' grekoj oni tiam buĉis. Kaj tio en la koron de l' patrino Enpremis tiel forte la malamon, Ke ŝi facile cedis al Egisto Kaj sian edzon ĵetis en pereon.

**IFIGENIO** (*sin kovrante*).

Sufiĉe! Nun vi baldaŭ min revidos.

**PILADO** (*sola*).

La sort' de l' reĝa domo ŝin videble Profunde tuŝas. Kiu ajn ŝi estas, Ŝi tute certe mem la reĝon konis. Feliĉe do por ni, el alta domo Ĉi tien oni vendis ŝin. Ho koro, Ne batu tiel forte! Al la stelo, De la espero, kiu ekbriletis, Ni remu do kuraĝe kaj prudente!

47

## **AKTO TRIA.**

### **SCENO UNUA.**

#### **IFIGENIO. ORESTO.**

**IFIGENIO.**

Malfeliĉulo, mi vin senĉenigas, Sed nur, ho ve! por sorto pli kruela. La liberec', donata de la templo, Simile al la lasta vivekbrilo De malfacila malsanul', prezentas Nur antaŭsignon de la morto. Tamen Ĝis nun ankoraŭ mi ne povas diri Kaj diri al mi mem mi ne kuraĝas, Ke vi pereis! Kiel do mi povus Per krima man' dediĉi vin al morto? Kaj tamen tiel longe, dum mi restas Pastrino de Dian', neniu havas La rajton iel tuŝi vian kapon. Sed se mi ne plenumos mian devon Laŭ la postulo de l' kolera reĝo, Li tiam inter miaj helpantinoj Alian virgulinon pastrinigos, Kaj tiam krom deziro plej varmega Mi jam nenion povos al vi doni. Ho, kara samlandan'! eĉ simpla sklavo, Sur kiun lumis nia hejma suno, En fremda land' tre kara al ni estas: 48 Kun kia do senlima ĝoj' kaj beno Mi

devas vin akcepti, kiuj dolĉeAl mi alportis bildon de herooj,De mi en infaneco adorataj,Kaj kiuj mian plej internan koronKonsolis per espero la plej bela.

**ORESTO.**

Ĉu vian nomon kaj devenon vianVi kaŝas kun intenco? aŭ ĉu ebleMi povas scii, kiu disimileNun staras antaŭ mi?

**IFIGENIO.**

Vi min ekkonos.Sed nun rakontu, kion via fratoAl mi ĝis nun sciigis nur duone,—La pluan sorton de l' personoj, kiuj,De Trojo reveninte, sur la sojloDe sia propra dom' neatenditanFatalon trovis. Kvankam mi tre junaAlvenis sur ĉi tiun fremdan bordon,Sed mi ankoraŭ bone rememorasLa grandan timon kaj la grandan miron,Kun kiu mi rigardis siatempeTiujn heroojn. Ili elveturis,Kaj tiam ŝajnis, kvazaŭ la OlimpoSubite malfermiĝis kaj la bildojnDe l' glora kaj mirinda mond' antikvaMalsupren sendis por la pereigoDe Iliono. Sed la plej majestaEl ĉiuj estis reĝ' Agamemnono!<sup>49</sup>Ho diru, ĉu li efektive falisPer la perfido de edzino siaKaj de Egisto?

**ORESTO.**

Jes, vi diris veron!

**IFIGENIO.**

Ho, ve al vi, Mikeno malfeliĉa!Tiele semis nepoj de TantaloPer plena man' malbenon post malbeno!Simile al kreskaĵo senvalora,Miloblan semon ĉirkaŭ si ĵetante,Por nepoj kaj pranepoj ili kreisParencajn mortigantojn por eternaSovaĝa reciproka venĝemeco!Malkovru ĉion, kion en la vortojDe via frat' por mi ankoraŭ kovrisLa ombro de l' teruro. Diru, kielLa lasta filo de la granda gento,La ĉarma knabo, certe destinitaPor iam fari venĝon por la patro,—Kiele li, Oresto, trovis savonEn tiu sanga tago? Ĉu li ankaŭPereis en la reto? Ĉu li vivas?Ĉu li saviĝis? Ĉu Elektro vivas?

**ORESTO.**

Jes, ambaŭ vivas.

**IFIGENIO.**

Ho vi, ora suno,Radiojn la plej belajn al mi pruntu<sup>50</sup>Kaj metu ilin kiel mian dankonAl Jupitero antaŭ lian tronon!Ĉar mi nur estas muta kaj malriĉa.

**ORESTO.**

Se vin kun tiu reĝa domo ligasIntima ia ligo aŭ rilatoj,Kiel kredigas via bela ĝojo,Ho, tiam tenu forte vian koron!Ĉar tre dolora estas por ĝojantoRefalo tro

subita en malĝojon. Vi scias, mi ĝin vidas, nur la morton De l' reĝ'  
Agamemnono.

**IFIGENIO.**

Kaj ĉu tio Ne estas por mi scio tro sufiĉa?

**ORESTO.**

Vi scias nur duonon de l' mizero.

**IFIGENIO.**

Kaj kio plu? Orest', Elektro vivas?

**ORESTO.**

Pri Klitemnestro vi nenion timas?

**IFIGENIO.**

Ŝin ja nek timo, nek espero savos.

**ORESTO.**

Ŝi el la lando de l' esper' foriris.

51

**IFIGENIO.**

Ĉu do pentante ŝi sin mem mortigis?

**ORESTO.**

Ne! sed la propra sango ŝin mortigis.

**IFIGENIO.**

Parolu klare, ke mi plu ne serĉu! La necerteco per flugil' malluma Milfoje batas  
ĉirkaŭ mia kapo.

**ORESTO.**

La dioj do destinas, ke mi estu La sciiganto de la faro, kiun Mi tiel volus kaŝi por  
eterne En la sensona regno de la nokto! Al tio kontraŭ mia propra volo Min nun  
devigas via ĉarma buŝo; Ĝi tamen havas rajton, por postuli Doloron ankaŭ;  
bone, ĝi ricevos. En tiu tag', kiam la patro falis, Elektro save kaŝis sian  
fraton; Strofio, la bofrato de la patro, Volonte lin akceptis kaj edukis Lin kune  
kun la propra sia filo, Pilado, kiu sin tre baldaŭ ligis Kun la veninto per plej bela  
ligo De la plej forta kora amikeco. Kaj ju pli ili kreskis, des pli forte En ili kreskis  
la deziro venĝi La morton de la reĝo. Kaj sekrete, En vestoj de fremduloj, ili

venis<sup>52</sup>Mikenon, kvazaŭ por alporti tienSciigon pri la morto de OrestoKaj ankaŭ lian cindron. Ilin boneAkceptis la reĝino, ili venisInternen de la domo. Al ElektroOrest' sin rekonigas; ŝi reblovasEn li la fajron de l' venĝemo, kiuEn la alesto sankta de l' patrinoJam preskaŭ estingiĝis. En silentoŜi lin kondukas al la loko, kieLa patro falis, kie tre malfortaMalnova postesigno de la sango,Jam preskaŭ tute plu ne rimarkebla,La plankon, multefoje jam lavitan,Ankoraŭ kolorigis. Tiam ŝiPer sia fajra lango nun priskribisĈiun detalon de la krima faroKaj sian sklavan kaj mizeran vivon,La fierecon de la perfidulojKaj la danĝerojn, kiuj la gefratojnAnkoraŭ nun minacas de la flankoDe la patrin' duonpatriniĝinta.Kaj tie al Oresto ŝi altrudisMalnovan la ponardon, kiu tiomEn la Tantara dom' jam furiozis ...Kaj propra fil' mortigis Klitemnestron ...

**IFIGENIO.**

Ho senmortuloj, vi, kiuj pasigasFeliĉajn tagojn super puraj nuboj,Ĉu nur por tio dum tre multaj jarojVi min de ĉiuj homoj apartigis<sup>53</sup>Kaj tenis min en via proksimecoKaj sur min metis la oficon virganLa sanktan fajron ĉiam subtenadiKaj la animon mian vi, simileAl flamo, ĉiam direktadis supren,Ke la terurojn de la domo miaEksentu mi nur iam pli malfrue,Sed tiom pli profunde?—Ho, paroluAl mi pri la junulo malfeliĉa!Parolu pri Oresto!

**ORESTO.**

Ho, se jam oni povus nun rakontiPri lia morto! Kvazaŭ fermentante,Leviĝis el la sang' de l' buĉitinoLa ombro de l' patrino.Al la filinoj de l' eterna noktoĜi krias: „tenu firme, ne forlasuLa mortiginton de l' patrino! PeluKaj persekutu la krimulon! Pelu!Al vi li apartenas!“—Ili aŭdas,Iliaj okulaĉoj ekrigardasĈirkaŭe kun la agla avideco.Kaj ili ekmoviĝas en la nigrajKavernoj, kaj el la anguloj venasSenbrue tuj ilia sekvantaro,La dubo kaj la pento. Antaŭ iliVapor' leviĝas el la Aĥerono;El ĝiaj nebulringoj ekruliĝasĈirkaŭe de la kapo de l' kulpuloSenĉesa freneziga meditadoPri l' faritaĵo. Tiam, rajtigita<sup>54</sup>Pereon porti, la inferulinojElpaŝas sur la belan dian teron,De kiu ilin antaŭ longa tempoForpelis la malbeno de la dioj.Pied' ilia pelas la kuranton,Ripozon ili donas nur momente,Por tuj ataki kun teruro nova.

**IFIGENIO.**

Ho malfeliĉa, en la sama statoVi estas mem, kaj tial vi komprenasKiome li, malfeliĉul', suferas!

**ORESTO.**

Kion vi diras? Kia sama stato?

**IFIGENIO.**

Vin, kiel lin, ja premas frاتمortigo; Al mi jam tion diris via frato.

**ORESTO.**

Sufiĉe! La animo via granda Per falsa vort' ne estu plu trompata! Fremdulo por fremdulo povas teksi Mensogon kaj ruzaĵon, por faligi Lin en la reton; inter ni ekzistu Nur vero! Mi estas mem Oresto! Kaj ĉi tiu Krimula kap' kliniĝas al la tombo Kaj serĉas morton. Kaj en ĉia formo Mi estas preta vole ĝin akcepti! Ho, kiu ajn vi estas, mi al vi<sup>55</sup> Kaj al amiko mia malfeliĉa Deziras savon; sed al mi la savon Mi ne deziras. Se mi ne eraras, Ĉi tie vi nur kontraŭvole restas; Eltrovu do rimedon, por forkuri, Sed min ĉi tie lasu. Mia korpo Malsupren falu de la alta roko, Ĝis maro fluu mia sang', portante Malbenon al la bordo de l' barbaroj! Vi iru, en la hejma greka lando Komencu novan, pli feliĉan vivon! (Li foriras.)

**IFIGENIO.**

Tiele do vi fine al mi venas, Vi, Plenumiĝ', filino plej ravanta De la plej granda patro! Ho, gigante Nun antaŭ mi leviĝas via bildo! Per la rigardo mia mi apenaŭ Atingas viajn manojn, kiuj plenaj De fruktoj kaj de benaj kronoj, portas Trezorojn de Olimpo. Kiel oni Ekkonas reĝon laŭ la grandmezuro De l' donoj—ĉar la kvanto, kiun multaj Jam nomus riĉo, al li devas ŝajni Malgranda—tiel oni vin, ho dioj, Rekonas laŭ la donoj tre ŝparataj, Sed longe kaj saĝege preparataj. Ĉar nur vi solaj scias, kio estas Por ni utila, nur vi solaj vidas La vastan regnon de la estonteco, Dum antaŭ ni la steloj kaj nebuloj<sup>56</sup> Ĉiuvespere kovras la rigardon. Trankvile vi aŭskultas nian preĝon, Petantan pri sensaĝa rapideco, Sed via man' neniam malmature Deŝiras la ĉielajn orajn fruktojn; Kaj ve al tiu, kiu ilin prenas Perforte tro frutempe: la acida Manĝaĵ' al li alportas nur la morton. Ne lasu, ke la longe atendita Feliĉ', apenaŭ iam esperita, Simile al la ombro de amiko Nun preterpasu vane, restigante Trioblan suferadon kaj doloron!

**ORESTO (denove aliras al ŝi).**

Se vi pri vi kaj pri Pilado preĝas, Ne citu mian nomon kun la viaj! Ne savos vi krimulon, sed kun li Dividos vi malbenon kaj mizeron.

**IFIGENIO.**

De via sort' dependas mia sorto.

**ORESTO.**

Nenie! Sola kaj sen akompano Mi iru en la regnon de la morto. Se eĉ per via propra kovrotuko Vi kovros la kulpulon, vi ne kaŝos Lin antaŭ la eterne-

maldormantoj; Alesto via, ho ĉielulino, Flankigos ilin, sed ne fortimigos. La teron de la sankta arbareto<sup>57</sup> Ne rajtas ili tuŝi arogante Per la piedoj, sed de malproksime De temp' al tempo aŭdas mi ilian Teruran ridon. Tiel blekas lupoj Ĉirkaŭe de la arb', sur kiun savis Sin vojaĝanto. Ekster la arbaro Ripozas ili, kvazaŭ sieĝante; Sed se mi nur forlasos la arbaron, Tuj ili ekleviĝos, balancante Serpentajn siajn kapojn, aperigos Ĉirkaŭe polvajn nubojn kaj pelados Akiron sian pluen, sen ripozo.

**IFIGENIO.**

Ĉu povas vi aŭskulti bonan vorton?

**ORESTO.**

Ĝin ŝparu por amato de la dioj!

**IFIGENIO.**

Espero nova nun por vi eklumis.

**ORESTO.**

Tra fumo nur briletas antaŭ mi La mortriver', vokante al infero.

**IFIGENIO.**

Ĉu vi fratinon havas nur Elektron?

**ORESTO.**

Nur ŝin mi konis; ĉar la pli maljunan Frutempe prenis for el la mizero<sup>58</sup> De nia domo ŝia bona sorto, En kiu ni nur teruraĵon vidis. Ho, ne demandu plu kaj ne aligu Vin al la Erinioj. Kun kruela Plezuro ili de l' animo mia La cindron blovas for kaj ne permesas, Ke la plej lastaj karboj, kiuj restis De la terura brul' de nia domo, En mia kor' kviete estingiĝu. Ĉu tiu fajr', intence incitata, Nutrata per sulfuro de l' infero Eterne en animo mia brulos?

**IFIGENIO.**

Mi dolĉan odoraĵon nun enportas En tiun fajron. Pura spir' de amo Per delikata blov' malvarmetigos La ardon, kiu bakas vian bruston! Oresto, mia kara! Ĉu ne povas Vi min kompreni? Ĉu de l' akompano De la teruraj diaj punantinoj La sang' en viaj vejnoj elsekiĝis? Ĉu el la kapo de Gorgon' penetris Ŝtoniga sorĉo ĉiujn viajn membrojn? Se elverŝita sango de patrino Per surda voĉo vokas al infero,—Ĉu pura bona vorto de fratino Ne vokos dian helpon de Olimpo?

**ORESTO.**

Ĝi vokas! Ha, ĉu tiel vi deziras Pereon mian? Ĉu en vi sin kaŝas<sup>59</sup> Diin' de venĝo? Kiu do vi estas, Vi, kies voĉo kruelege turnas La plej profundan mian internaĵon?

**IFIGENIO.**

Eksentu do la voĉon de la koro: Orest'! ĝi estas mi, Ifigenio! Mi vivas!

**ORESTO.**

Vi!

**IFIGENIO.**

Ho, frato!

**ORESTO.**

For! ho, for! Ne tuŝu miajn buklojn! Ĉar, simile Al la edziĝa vesto de Kreuzo, Per nevenkebla fajro mi infektas. Foriru! Kiel iam Herkuleso, Mi devas preni morton izolite.

**IFIGENIO.**

Vi ne pereos! Ho, se mi nur povus Trankvilan unu vorton de vi aŭdi! Forigu mian dubon, ho, certigu, Certigu al mi tute la feliĉon, Pri kiu tiel longe mi petegis. Ĉar rado de doloro kaj de ĝojo En mia kor' ruliĝas. De l' fremdulo Forpuŝas min la timo; sed plej forte Min la interno tiras al la frato.

60

**ORESTO.**

Ĉu staras mi en templo de Lieo? Ĉu furioza puŝo de pasio Atakis nun subite la pastrinon?

**IFIGENIO.**

Ho, aŭdu min! Ho, vidu, kiel fine Post longa, longa tempo mia koro Nun malfermiĝis por la granda ĝojo, Ke al la sola kaj al la plej kara El ĉio, kio en la tuta mondo Por mi ankoraŭ restis, mi nun povas La kapon kisi; ke per miaj brakoj, Ĝis nun nur al la vento etenditaj, Mi fine vin nun povas ĉirkaŭpreni! Ho, lasu! lasu! Ĉar eĉ de l' Parnaso La fonto, kiu saltas en la valon, Ne fluas tiel pure, tiel hele, Kiel nun fluas senmezura ĝojo El mia koro, fluas kaj ĉirkaŭas Min kiel granda ondoplena maro. Oresto! Ho, Oresto! Mia frato!



**ORESTO.**

Ne, bela nimfo, ne, mi ne konfidas Al vi kaj viaj flatoj. Ne forgesu, Dian' postulas servon la plej ĉastan; Ŝi venĝas malsanktigon de la templo. De mia brust' forigu vian brakon! Kaj se vi volas doni al junulo Savantan amon kaj lin feliĉigi, Vin tiam turnu al amiko mia,<sup>61</sup> La viro pli valora. Jen li vagas Sur la vojeto tie sur la roko; Al li vi iru kaj al li vi donu Konsilon bonan, sed min lasu for!

**IFIGENIO.**

Rekonsciiĝu, frato, kaj rekonu La trovitinon! La ĉielan ĝojon, La puran, ĉastan ĝojon de fratino Ne nomu senprudenta volupteco! Ho, dioj, prenu la manian kovron For de okulo lia la rigida, Ke la momento de l' plej alta ĝojo Ne faru nin trioble malfeliĉaj! Jen antaŭ vi ŝi staras, la fratino De longe jam perdita. De l' altaro Min la diino tiris for kaj savis Ĉi tien min en sian propran templon. Kaj vi, kaptita kaj oferbuĉota, En la pastrino trovas la fratinon.

**ORESTO.**

Ho, malfeliĉa! Nun la suno vidu De nia dom' la lastan teruraĵon! Ĉu ne troviĝas tie ĉi Elektro? Ŝi ankaŭ nun kun ni pereu kune, Por ne daŭrigi sian vivon sole Por sorto kaj suferoj pli turmentaj! Pastrin', al la altaro min konduku: La frاتمortigo estas tradicio Hereda en malnova nia gento; Vin, dioj, dankas mi, ke vi decidis<sup>62</sup> Min pereigi fraŭle, sen infanoj. Kaj vi de mi akceptu la konsilon, Ne amu tro la sunon kaj la stelojn; Ho, sekvu min en la malluman regnon! Simile kiel drakoj sulfurmarĉaj Sin en batal' englutas reciproke, La furioza gento de Tantalo Sin mem ekstermas; iru do kun mi Malsupren seninfane kaj senkulpe! Vi min rigardas kun kompatato? Ĉesu! Sammaniere serĉis Klitemnestro Resonon en la kor' de sia filo; Sed lia brako trafis ŝian bruston, Kaj la patrino falis. Ho, aperu, Spirito indignanta! Vi, furioj, Alproksimiĝu per fermita rondo, Rigardu la al vi agrablan dramon, La plej teruran, kiun vi preparis! Ne venĝo aŭ malamo nun akriĝas Ponardon sian: la fratin' amanta Nun estas devigata doni morton. Ne ploru! Ĝi ne estas via kulpo. De mia infaneco mi nenion Tiele amis, kiel vin mi povus Nun ami, ho, fratino mia kara. Jes, levu la ponardon, ne indulgu, Disŝiru tiun bruston, donu vojon Al la torentoj, kiuj en ĝi bolas! (Li falas svene.)

**IFIGENIO.**

Elporti sola tiom da feliĉo<sup>63</sup> Kaj tiom da suferoj mi ne povas. Pilado, kie estas vi, Pilado? Alportu vian helpon, kara viro! (Ŝi foriras serĉante.)

SCENO DUA.

ORESTO (vekigante el la sveno kaj leviĝante).

Ankoraŭ unu! Donu do al mi! El Leta akvo lastan refreŝigan Kalikon! Baldaŭ el la  
brust' elnaĝos la lasta konvulsio de la vivo. Tre baldaŭ la spirito mia  
fluos Trankvile al la fonto de forgeso, Al vi, fantomoj, al nebul' eterna. Permesu,  
ke en via mezo trovi Ripozon la pelita fil' de l' tero! Mi aŭdas murmureton en la  
branĉoj, El la krepusko venas ia bruo ... La novan gaston vidi ili venas! Ha, kia  
estas la anaro, kiu Majeste iras, kvazaŭ princa domo? Maljunaj, junaj, viroj kaj  
virinoj Kviete marŝas. Disimilaj ŝajnas Pasantaj la fantomoj. Jes, mi vidas, Jen  
la prapatroj de la domo mia. Atreo marŝas pace kun Tiesto; La knaboj gaje  
ludas ĉirkaŭ ili. Ĉu vin jam plu malpaco ne disigas? Ĉu kune kun la lumo de la  
suno La venĝo estingiĝis? Tiam min Vi ankaŭ ja akceptos kaj mi povos aliĝi al  
solena via marŝo. Bonvenon, patroj! Vin salutas Oresto, La lasta viro de via  
gento; Kion vi semis, li ĝin rikoltis: Kun ŝarĝ' de malbeno li iras malsupren. Sed  
malpli ĉi tie pezas la ŝarĝoj. Prenu lin, prenu en vian anaron! Mi estimas  
Atreon, mi estimas Tieston: Ĉi tie ni ĉiuj perdis malamon.—Al mi montru la  
patron, kiun mi vidis Nur unu fojon en mia vivo! Ĉu vi ĝi estas, la patro mia? Kaj  
la patrinon vi ame kondukas? Se donas la manon al vi Klitemnestro, Tiam  
ankaŭ Oresto povas alpaŝi! Kaj diri al ŝi: vian filon rigardu!—Vidu ambaŭ la  
filon! Akceptu lin bone! Sur tero ja estis salut' de mortigo La vorto signala en nia  
domo, Kaj siajn ĝojojn la gento Tantala Trovis nur transe de l' nokto eterna. Vi  
vokas: Bonvenon! vi min akceptas! Min konduku, mi petas, al la maljunulo, Al la  
patro de l' gento! Kie li estas? Mi volas lin vidi, la kapon la karan, La adoratan,  
kiu sidadis En konsiliĝ' kun la dioj senmortaj. Ŝajnas, vi tremas, vi vin  
deturnas? Ĉu li suferas, la diosimila? Ho ve! la plej altaj la potenculoj Per feraj  
ĉenoj la bruston heroan Por teruraj turmentoj alforĝis!

65

SCENO TRIA.

ORESTO. IFIGENIO. PILADO.

**ORESTO.**

Ĉu ankaŭ vi jam venis malsupren? Bonvenon, fratino! Sed mankas Elektro! Ŝin  
ankaŭ sendu al ni plej baldaŭ la bona dio per sago kompata! Nur vin mi

bedaŭras, malfeliĉa amiko! Ho, venu, venu al la tron' de Plutono, Kiel novaj gastoj ni salutu la mastron!

**IFIGENIO.**

Ho, vi, gefratoj, kiuj de l' ĉielo En tag' kaj nokto al la homoj donas La belan lumon, sed ne rajtas lumi Al la mortintoj,—savu nin, gefratojn! Ho, vi Diano, kiu vian fraton Amegas pli ol ĉion en la mondo Kaj la vizaĝon virgan kun sopiro Direktas al eterna lia lumo,—Ne lasu do, ke mia sola frato, Malfrue retrovita, furiozu En la mallumo de la frenezeco! Se via vol', pro kiu vi ĉi tie Min kaŝis, nun jam estas plenumita, Se min per li kaj lin per mi vi volas Mirakle savi, tiam liberigu Lin de l' katenoj de l' malbeno lia, Ke la tre kara tempo de la savo Por ĉiam ne forflugu!

66

**PILADO.**

Ĉu vi rekonas nin? Ĉu vi rekonas La sanktan arbareton kaj la lumon? Ĝi ja ne povus lumi por mortintoj! Ĉu sentas vi la brakojn de l' amiko Kaj de l' fratino, kiuj vin ankoraŭ En plena vivo tenas? Palpu forte! Ne estas ni fantomoj. Konvinkiĝu! Rekonsciĝu! Ĉiu minuteto Nun estas kara; nia savo pendas Nun sur faden' malforta, kiun ŝpinas Por ni, videble, ia bona Parko.

**ORESTO (al Ifigenio).**

Ho, lasu min je la unua fojo En viaj brakoj ĝui puran ĝojon! Vi, dioj, kiuj kun potenco flama La ŝarĝon de l' nubegoj liberigas Kaj la sopire petegitan pluvon Kun bruo de ventego kaj de tondro Sovaĝtorente verŝas sur la teron, Sed baldaŭ la teruron de la homoj Vi faras beno kaj la timon ŝanĝas En ĝojon kaj en laŭtan dankon, kiam En gutoj de folioj freŝegitaj La nova sun' miloble speguliĝas Kaj per afabla man' Iriso ŝiras La grizan kovron de la lastaj nuboj: Ho, lasu ankaŭ min nun en la brakoj De la fratino, ĉe l' fidela brusto De la amik' kun plena danko ĝui Kaj teni, kion vi al mi donacis! 67 Forfalas la malbeno, tion diras Al mi la koro; jam la Eŭmenidoj Returne kuras nun al la Tartaro Kaj tondre fermas feran la pordegon. La ter' elspiras freŝon bonodoran Kaj min invitas nove aspiradi Al ĝoj' de l' vivo kaj al grandaj faroj.

**PILADO.**

Rapidu, ĉar la tempo baldaŭ pasos! La vento, kiu blovos niajn velojn, Nur ĝi forportu nian plenan ĝojon Al la Olimpo. Nun ni devas nepre Rapide konsiliĝi kaj decidi.

## AKTO KVARA.

### SCENO UNUA.

IFIGENIO (sola).

Se por mortemulo La dioj destinas Tre multajn konfuzojn Kaj por li  
preparas Skuantan transiron De ĝoj' al doloro, De suferoj al ĝojo: Tiam apud la  
urbo Aŭ sur bord' malproksima li por li edukas Amikon trankvilan, Ke en hor' de  
mizero Estu preta la helpo. Ho, benu, dioj, benu vi Piladon Kaj benu ĉiun lian  
entreprenon! Li estas forta brako en batalo, Li estas luma saĝo en kunveno, Ĉar  
tre trankvilan havas li animon Kaj al la suferantoj li alportas Konsilon kaj en  
ĝusta tempo helpon. Min li forŝiris de la frato, kiun Mi kun ador' senfine  
rigardadis, Mi ĝojis kaj mi ĝuis, mi ne povis Satiĝi de l' feliĉo mia propra, Mi lin el  
miaj brakoj ne ellasis,<sup>69</sup> Kaj mi ne sentis la danĝeron, kiu Ĉirkaŭis nin kaj estis  
tre proksima. Nun ili, por plenumi la intencon, Jam iras al la mara bordo,  
kie, Kaŝite en la golf', ilia ŝipo Atendas nur la signon. Kaj al mi Prudentajn  
vortojn ili en la buŝon Enmetis kaj instruis min, kiele Mi al la reĝ' respondu, se li  
sendos Insiste ekpostuli la oferon. Mi vidas, mi min devas lasi gvidi Simile al  
infano; mi ne lernis Inside aŭ per ruz' ion akiri. Ho ve al mensogantoj! La  
mensogo Neniam liberigas nian bruston Simile al la vortoj de la vero; Ĝi ne  
konsolas nin, ĝi nur turmentas La homon, kiu ĝin sekrete forĝas, Kaj kiel sago,  
kiun en la flugo Potenca dio kaptas kaj rebatas, Ĝi celon ne atingas, sed  
resaltas Kaj trafas tiun, kiu ĝin elpafis. Ho, pezaj zorgoj premas mian  
bruston. Ĉu eble sur la ter' nesanktigita De l' bordo nun denove la furio Atakis  
plej kruele mian fraton? Ĉu eble ili estas malkaŝitaj? Ha, ŝajnas, ke armitoj  
proksimiĝas! Ha, jen! Jen kuriero de la reĝo Ĉi tien venas per rapidaj paŝoj. La  
koro en mi batas, la animo Kovriĝas per nebulo, kiam mi<sup>70</sup> Nun devas ekrigardi  
la vizaĝon De l' vir', al kiu devas mi mensogi.

### SCENO DUA.

IFIGENIO. ARKAS.

**ARKAS.**

Rapidu, ho pastrin', kun la ofero! La reĝ' atendas, la popol' postulas.

**IFIGENIO.**

Mi volus tuj plenumi mian devon, Sed ve, malhelpo neantaŭvidita Stariĝis inter mi kaj la plenumo.

**ARKAS.**

Ha, kio baras reĝan la ordonon?

**IFIGENIO.**

Okazo, kiu ne de ni dependas.

**ARKAS.**

Rakontu, ke mi tuj al li raportu, Ĉar li decidis jam, ke ambaŭ mortu.

**IFIGENIO.**

La dioj ĝin ankoraŭ ne decidis. El tiuj viroj la plej aĝa portas Sur si la kulpon de parencmortigo. Lin la furioj venĝe persekutas, Kaj eĉ en la interno de la templo Atakis lin malsano la kruela<sup>71</sup> Kaj malsanktigis la plej puran lokon. Mi nun kun virgulinoj miaj iras, Por per lavado en la pura maro Laŭ la misteraj leĝoj de la pastroj La bildon de l' diino resanktigi. Neniu nin malhelpu en la iro.

**ARKAS.**

Mi iros tuj raporti al la reĝo Pri la malhelpo; la ceremonion Vi ne komencu, ĝis li ĝin permesos.

**IFIGENIO.**

Ĝi estas nur afero de l' pastrino.

**ARKAS.**

La gravan fakton reĝo devas scii.

**IFIGENIO.**

Sed lia vol' nenion povas ŝanĝi.

**ARKAS.**

Pro formo potenculon ni demandas.

**IFIGENIO.**

Ne trudu, kion devus mi rifuzi.

**ARKAS.**

Konsentu tion, kio estas bona.

**IFIGENIO.**

Mi cedos, se ne tro vi malrapidos.

72

**ARKAS.**

Mi post momento estos ĉe la reĝoKaj tuj returne kun la vortoj liaj.Ho, se mi ankaŭ povus al li portiSciigon, kiu ĉion klare solvus!Ho ve, ke vi ne sekvis la konsilonDe fidelulo!

**IFIGENIO.**

Volonte ja mi faris, kion povis.

**ARKAS.**

Ankoraŭ nun vi povas ĉion ŝanĝi.

**IFIGENIO.**

De mia volo tio ne dependas.

**ARKAS.**

Neplaĉantaĵon trovas vi ne ebla.

**IFIGENIO.**

Vi trovas ebla, kion vi deziras.

**ARKAS.**

Ĉu ĉion tiel pesas vi trankvile?

**IFIGENIO.**

Mi lasis la decidon al la dioj.

**ARKAS.**

Sed ili ja la homojn savas home.

73

**IFIGENIO.**

Mi faros ĉion, kion ili diros.

**ARKAS.**

Ho, kredu, ĉio nur de vi dependas.Nur la kolera stato de la reĝoAl ambaŭ la fremduloj donas morton.Jam de tre longe la militistaroDekutimiĝis de l' oferoj sangaj.Eĉ multaj, kiujn malamika sortoAl fremda bordo pelis, sentis memLa

tutan ĉarmon, tutan la diecon, Se la vaganton en la fremda lando Renkontas bondezira kaj afabla Vizaĝo homa. Ho, ne tiru for De ni la bonon, kiu por ni ĉiuj De vi dependas! Kion vi komencis, Vi povas ja facile alfinigi; Ĉar la mildeco, kiu de l' ĉielo En homa formo venas sur la teron, Nenie pli rapide al si regnon Konstruas, ol en tiu loko, kie Sovaĝe kaj konfuze nova gento, Plenega de kuraĝo kaj de forto, Gvidata per la propraj antaŭsentoj, La ŝarĝojn de la homa vivo portas.

**IFIGENIO.**

Ne skuu la animon mian, kiun Laŭ via vol' direkti vi ne povas.

74

**ARKAS.**

Dum temp' ankoraŭ estas, oni ŝparas Nek penon, nek admonon ripetatan.

**IFIGENIO.**

Al vi klopodojn kaj al mi suferojn Vi kaŭzas, tamen ambaŭ estas vanaj.

**ARKAS.**

De la suferoj mi nun petas helpon, Ĉar plej amike ili ja konsilas.

**IFIGENIO.**

Kruele ili ŝiras mian koron, Sed la malvolon ili ne ekstermas.

**ARKAS.**

Ĉu povas nobla kor' malvolon havi Por bono, kiun nobla hom' proponas?

**IFIGENIO.**

Jes, se la nobla hom' anstataŭ danko Min mem akiri malkonvene volas.

**ARKAS.**

Se iu ne deziras, tre facile Li ĉiam trovas vortojn de praviĝo. Mi pri l' oferoj al la reĝ' raportos. Ho, se vi en la kor' al vi ripetus, Kiele noble li kun vi agadis De via veno ĝis la nuna tago!

75

SCENO TRIA.

IFIGENIO (sola).

De la parol' de tiu viro nunEn plej malĝusta tempo mia koroSubite returniĝis.  
Mi ektimas!Ĉar kiel ondoj en potenca kreskoLa rokojn superverŝas, kiuj  
starasĈe l' bordo en la sablo, tiel fluoDe ĝojo mian koron tute kovris.Mi en la  
brakoj tenis neblaĵon.Nun al mi ŝajnis, ke denove nubokviete min ĉirkaŭas,  
de la teroMin levas kaj min dolĉe endormigas,Simile kiel tiam, kiam minLa  
brako de l' diin' savante kaptis.La fraton mian kaptis mia koroPer sia tuta forto;  
mi aŭskultisNur la konsilon de l' amiko lia;Nur ilin savi estis la enhavoDe miaj  
pensoj. Kiel la ŝipanoVolonte sin deturnas de la rifojDe negastama kaj dezerta  
lando,Mi tiel de Taŭrido min deturnis.Sed nun la voĉo de l' fidela viroMin ree  
vekis, min rememorigis,Ke ankaŭ ĉi mi ja forlasas homojn.Duoble abomena  
nun fariĝasPor mi la trompo. Ho, animo mia,Retrankviliĝu! Ĉu vi nun  
komencasDubeme ŝanceliĝi? Ne! la teronDe la soleco devas vi  
forlasi!<sup>76</sup>Enŝipigitan kaptos vin la ondojPer sia balancado,—nun pro timoVi  
nek la mondon, nek vin mem rekonas.

SCENO KVARA.

IFIGENIO. PILADO.

**PILADO.**

Ha, kie estas ŝi, ke mi rapiduAl ŝi alporti ĝojan la sciigonPri nia savo!

**IFIGENIO.**

Vidu, jen mi estas,De zorgoj premegata, mi atendasNun la konsolon, kiun vi  
promesas.

**PILADO.**

La frato resaniĝis! La ŝtonecanEkstersanktejan teron kaj la bordonAtingis ni  
en gaja parolado.Ni ne rimarkis, kiam ni forlasisLa arbareton. Ĉiam pli  
ravanteLa bela flamo de junec' ĉirkaŭisLa buklan lian kapon. Hele brilisKuraĝe  
kaj espere la okuloj,Kaj lia kor' libere sin fordonisPlenege al la ĝojo kaj  
plezuro.Ke vin kaj min li baldaŭ povos savi.

**IFIGENIO.**

Benata estu! De la lipo, kiu<sup>77</sup>Eldiris tiajn feliĉigajn vortojn,Neniam sonu tono  
de suferoj!



**PILADO.**

Aŭskultu plu; feliĉo kiel princoKun bela sekvantaro ĉiam marŝas.La kamaradojn ankaŭ ni retrovis;En roka golf' la ŝipon ili kaŝisKaj sidis atendante kaj malĝoje.Apenaŭ ekvidinte vian fraton,Ekkriis ili ĝoje, kaj insisteLa ŝipanaro petis rapidigiLa forveturon. Ĉiu man' sopirasRemilon, kaj eĉ vento, de ni ĉiujTuj rimarkita, ĉarmajn la flugilojnEtendis kaj ekblovis de la bordo.Ni do rapidu, kaj vi tuj kondukuMin al la templo, lasu min eniriKaj kapti respektige la objektonDe nia celo! Mi sufiĉos sola,Por porti for sur miaj fortaj ŝultrojLa bildon de l' diino; kiel forteMi sopiregas la celitan ŝarĝon!(Ĉe la lastaj vortoj li sin direktas al la templo, ne rimarkante, ke Ifigenio lin ne sekvas; sed baldaŭ li sin returnas.)Vi staras sendecide! Vi silentas!Vi ŝajnas konfuzita! Ĉu aperisBarante ia nova malfeliĉo?Ho, diru, ĉu vi al la reĝ' raportisLa vortojn, kiujn ni interkonsentis?

78

**IFIGENIO.**

Jes, kara viro; sed vi min insultos.Mi sentas jam silentan la riproĉon!Sendito de la reĝo al mi venis,Kaj kion vi al mi instruis, tionMi al li diris. Ŝajnas, ke li estisTre mirigita, kaj li tre insistis,Ke pri l' malofta la ceremonioRaporton oni faru al la reĝoKaj aŭdu lian volon; kaj mi nunAtendas la revenon de l' sendito.

**PILADO.**

Ho, ve al ni! Renovigita flugasNun la danĝero ĉirkaŭ niaj kapoj!Nu, kial do vi vin ne kovris saĝePer rajtoj de pastrino?

**IFIGENIO.**

Mi neniamKovrilon faris el la pastra rajto.

**PILADO.**

Ho, tiam vin kaj nin, animo pura,Vi pereigos. Kial mi ne pensisPri ĝi antaŭe kaj vin ne instruisEviti ankaŭ tiun ĉi postulon!

**IFIGENIO.**

Nur min insultu! Mi nur estas kulpa,Mi tion sentas; tamen mi ne povisRifuzi al la vir', kiu postulis79Prudente tion, kion mia koroNe povis ja ne trovi tute prava.

**PILADO.**

La stato nun fariĝis pli danĝera;Sed ankaŭ tiel ni ne devas perdiKuraĝon, aŭ per agoj neprudentajAŭ tro rapidaj mem nin elperfidi.Trankvile nun atendu la revenonDe la sendito, kaj post liaj vortojVi staru forte, kion ajn li diros!Ĉar la

aranĝo de sanktigaj farojJa estas ne afero de la reĝo,Sed de l' pastrino. Kaj se  
li dezirasEkvidi la fremdulon, kiun pezeAtakis konvulsioj de frenezo,Rifuzu sub  
preteksto, ke vi tenasNin ambaŭ nun kaŝitaj en la templo.Tiele vi al ni la eblon  
donos,Ke, forportante sanktan la trezoronFor de l' popolo kruda kaj  
barbara,Rapide ni forkuru kaj saviĝu.Plej bonajn signojn sendas Apolono,Kaj  
antaŭ ol ni pie la kondiĉonPlenumis, li al ni jam aperigisFavoron sian, kiun li  
promesis.Oresto liberiĝis kaj saniĝis!Kun li, kun nia kara liberulo,Konduku nin,  
ho vi, favoraj ventoj,Al la insulo roka, kie loĝasLa dio! Kaj tuj poste al  
Mikeno,Ke ĝi revivu, ke nun el la cindro80De ĝiaj estingitaj fajrolokojLa patraj  
dioj ĝoje releviĝuKaj bela fajro lumu nun denovePor ili. Via mano la unuaPor ili  
ŝutos el la oraj vazojIncenson. Trans la sojlon vi enportosDenove savon,  
ĝojon, novan vivon,Kaj la malbenon vi malaperigos,Kaj vian familion vi  
ornamosPer novaj, freŝaj floroj de la vivo.

**IFIGENIO.**

Ho, kiam mi vin aŭdas, mia kara,Tuj mia kor', trafita de l' radioDe viaj vortoj,  
turnas sin feliĉeAl dolĉa la konsolo, kiel floroSin turnas al la suno. Kian  
ĝojonAlportas firmaj vortoj de amikoApudestanta! tiuj vortoj havasĈielan  
forton, dum solulo falasSub ŝarĝ' de sia propra meditado!Ŝlositaj en la brusto,  
maturiĝasNur malfacile kaj tre malrapideLa pensoj kaj decidoj, sed alestoDe  
kara homo ilin tre facileDisvolvas.

**PILADO.**

Nun adiaŭ! Mi rapidosNun trankviligi la amikojn, kiujAtendas sopirante. Poste  
baldaŭĈi tien mi revenos kaj, kaŝitaEn arbitraj de roko, mi atendos81De vi  
signalon.—Tamen diru, kialVi nun meditas? Vian frunton kovrisSubite ia  
ombro de malĝojo.

**IFIGENIO.**

Pardonu! Kiel la senpezaj nubojAntaŭe de la suno, tiel flugasMalgranda zorgo  
antaŭ mia koro.

**PILADO.**

Ne timu! Nur por trompi la danĝeroSin ligis kun la timo. Ambaŭ estasKunuloj.

**IFIGENIO.**

Tamen ne malnobla estasLa zorgo, kiu penas min averti,Ke mi ne trompu  
mian reĝon, kiuPor mi fariĝis kvazaŭ dua patro.

**PILADO.**

La homon, kiu buĉas vian fraton!

**IFIGENIO.**

La homon, kiu faris al mi bonon.

**PILADO.**

Se la neces' ordonas, ĝi ne estas Maldanko.

**IFIGENIO.**

Tamen restas ĝi maldanko; Nur la neces' ĝin senkulpigas.

82

**PILADO.**

Prava Vi estas antaŭ dioj, antaŭ homoj.

**IFIGENIO.**

Sed mia propra koro ne silentas.

**PILADO.**

Tro-severeco estas fiereco.

**IFIGENIO.**

Mi tion ne esploras, mi nur sentas.

**PILADO.**

Kun ĝusta sent' vi devas vin adori.

**IFIGENIO.**

Feliĉa estas kor' nur tute pura.

**PILADO.**

Vi tia vin konservis en la templo; La vivo nin instruas esti malpli Severa kontraŭ ni kaj la aliaj; Vi ankaŭ tion lernos. Tiel strange La homa gento estas konstruita, Tiele ĉio estas reciproke Interplektita kaj interligita, Ke en si mem aŭ kun aliaj homoj Neniu povas resti tute pura Aŭ senkonfuza. Ni ne devas esti Juĝantoj pri ni mem. La homo devas Nur marŝi kaj observi sian vojon; 83 Ĉar tre malofte homo ĝuste taksas Faritajn siajn farojn, sed li preskaŭ Neniam scias taksi la faratajn.

**IFIGENIO.**

Vi preskaŭ min konvinkis.

**PILADO.**

Sed por kioKonvinki, se elekto ne ekzistas?Por savi fraton, vin kaj la amikon,Nur unu voj' ekzistas; tial restasNur la demand', ĉu ni la vojon iras?

**IFIGENIO.**

Ho, lasu min heziti! ĉar vi memNe farus kun anima trankvilecoTielan maljustaĵon kontraŭ homo,De kiu vi ricevis nur bonfarojn.

**PILADO.**

Se ni pereos, tiam vin atendasRiproĉo pli severa, kondukantaAl malesper'. Vi certe ne kutimisSuferi perdojn, se nun, por evitiGrandegan malfeliĉon, vi ne volasOferti eĉ vorteton de malvero.

**IFIGENIO.**

Ho, se mi en mi portus viran koron,Por kiu, se ĝi ion jam decidis,Aliaj ĉiuj voĉoj restas mutaj!

84

**PILADO.**

Vi vane ŝanceliĝas. Nun ordonasLa fera mano de la neceseco,Kaj ĝia serioza signo estasPlej alta leĝo, kiun eĉ la diojObei devas. La nekonsileblaFratino de l' eterna sorto regasSilente. Se sur vin ĝi ion metis,Vi tion portu! kaj se ĝi ordonis,Plenumu sendispute. La ceteranVi ĉion scias. Baldaŭ mi revenos,Por preni el la sankta via manoDe nia sav' la belan sigelilon.

## SCENO KVINA.

IFIGENIO (sola).

Mi sekvu lin; ĉar mi la miajn vidasUrĝante en danĝero. Tamen ve!La propra mia sorto min timigas.Ĉu mi ne savu la esperon, kiunMi en soleco tiel bele nutris?Ĉu la malbeno daŭru do eterne?Ĉu tiu gent' neniam sin relevuKun nova beno? Ĉio ja forpasas!Feliĉo la plej bona kaj de l' vivoPlej belaj fortoj fine malaperas!Pro kio do malben' ne malaperus?Ĉu tie ĉi kaŝita, deŝiritaDe la kuranta sort' de mia domo,Mi vane do esperis, ke mi iamPer pura mano kaj per pura koro<sup>85</sup>La makulitan domon senpekigos?Apenaŭ mia frat' en miaj brakojDe sufereg' mirakle resaniĝas,Apenaŭ longe sopirita ŝipoAlproksimiĝas, por min forkondukiAl la haveno de la hejma lando,—La surda neceseco sur

min metasPer fera mano jam duoblan krimon:Forrabi sanktan, al mi  
konfiditanKaj adoratan bildon kaj samtempeFripone trompi viron, kiu zorgisPri  
mia vivo kaj pri mia sorto.Ho, mi jam timas, ke en mia koroEkĝermi iam povas  
abomeno,Ke la malam' profunda de l' titanojRilate al la dioj de OlimpoJam  
ankaŭ mian delikatan brustonEkkaptus per ungegoj de vulturo!Ho, bonaj dioj,  
savu min kaj savuEn la animo mia vian bildon!En la oreloj la malnova  
kanto,Jam forgesita, nun al mi resonas,La kanto, kiun kantis kun teruroLa  
Parkoj, kiam de la ora seĝoTantalo falis. Ili mem suferisKun la amiko. En ilia  
brustoVentego bruis, kaj terura estisIlia kanto. En la infanecoMi aŭdis ĝin de  
mia vartistino;Mi bone ĝin memoras.

Ho, gento de homoj,Vi timu la diojn,<sup>86</sup>Ĉar ili regadonEterne posedasKaj povas  
ĝin uziLaŭ sia bontrovo.

Plej timu la homo,Se dioj lin levis!Sur rifoj kaj nubojJen staras la seĝojĈe  
tabloj el oro.

Aperas malpaco,Kaj falas la gastojKun hont' kaj ofendojEn noktajn  
profundojnKaj tie ligitajAtendas nur vaneJustecon kaj juĝon.

Sed restas la mastrojEn festoj eternajĈe l' tavoloj el oro.Kaj el la abismojLa  
spir' de l' titanojOfere falintajPer fumaj nubetojAl ili leviĝas.

Kaj ili deturnasBenantan okulonDe tuta la gento,Kaj eĉ en la nepoLa iam  
amitaj<sup>87</sup>La trajtoj de l' avoJam ilin incitas.

Tiel kantis la Parkoj;Kaj la ekzilitoEn noktaj kavernojAŭskultas la kantonKaj,  
pri la infanojKaj nepoj pensante,Balancas la kapon.

## **AKTO KVINA.**

### **SCENO UNUA.**

### **TOAS. ARKAS.**

**ARKAS.**

Mi devas kun konfuz' al vi konfesi, Ke mi ne scias, kien la suspekton  
Mi devas nun direkti. Ĉu ĝi estas Ruzaĵo de l' kaptitoj, kiuj penas  
Sekrete kuri for? Ĉu la pastrino Al ili donas helpon? Pli kaj pli  
La famo kreskas, ke la ŝipo, kiu Al ni alportis ambaŭ la fremdulojn,  
Ankoraŭ ie staras en la golfo; Kaj tiu frenezeco de la viro,  
Kaj tiu resanktigo, la preteksto De la prokrasto, vekas ĉiam  
pli Suspekton kaj postulas singardecon.

**TOAS.**

Rapide al ni venu la pastrino! Kaj poste iru, akre kaj rapide  
Esploru, serĉu sur la tuta bordo, De l' promontoro ĝis la arbareto  
De la diin'. Sed sanktan la profundon Respektu;  
nur embuskon saĝe faru, Ataku la fremdulojn kaj, trovinte,  
Laŭ la kutimo via ilin kaptu.

89

**SCENO DUA.**

TOAS (sola).

Terure nun alternas la kolero En mia kor': jen kontraŭ ŝi, en kiu  
Mi vidis tiel puran sanktulinon, Jen kontraŭ mi, ĉar per malsevereco  
Kaj per boneco mi ŝin mem edukis Por la perfido. Homo tre facile  
Al kutimiĝas al la sklava stato Kaj baldaŭ lernas plenan obeadon,  
Se oni lian tutan liberecon Forprenas. Jes, se en la krudan manon  
De la prapatroj miaj ŝi enfalus, Ŝi estus ĝoja, se ŝi mem saviĝus,  
Ŝi danke alte ŝatus sian sorton Kaj antaŭ la altaro fremdan  
sangon Volonte verŝus, kaj la necesajon Ŝi nomus sankta devo.  
Dume nun En ŝia brust' boneco mia naskas Deziron arogantan.  
Vane mi Esperis, ke mi ŝin al mi alligos; Ŝi mem por si preparas  
sian sorton. Per flatoj ŝi akiris mian koron; Se al la flatoj nun  
mi kontraŭstaros, Ŝi per ruzaĵo kaj per trompo serĉos Al si la  
vojon, kaj boneco mia Al ŝi aperas kiel posedaĵo, De longe jam al ŝi  
apartenanta.

90

**SCENO TRIA.**

IFIGENIO. TOAS.

**IFIGENIO.**

Vi vokas! Kio vin al ni venigas?

**TOAS.**

Oferon vi prokrastis; diru, kial?

**IFIGENIO.**

Al Arkas ĉion klare mi rakontis.

**TOAS.**

De vi mi volus tion aŭdi.

**IFIGENIO.**

Tempon Al vi Diano donas, por pripensi.

**TOAS.**

Mi pensas, ke ĉi tiu tempo estas Tre taŭga por vi mem.

**IFIGENIO.**

Se via koro En la decid' kruela rigidiĝis, Por kio do vi venis? Reĝo, kiu Postulas kruelaĵon, povas trovi Sufiĉe da servantoj, kiuj ĝoje Por rekompenco prenos sur sin mem Duonon de l' malbeno, kaj la reĝo Almenaŭ ŝajne restus senmakula. En peza nuboj faras Jupitero Decidojn, kaj sendatoj liaj portas Pereon al la kapoj malfeliĉaj; Sed li trankvile marŝas en la altoj, Ne atingeblo dio en ventego.

**TOAS.**

La sankta lipo kantas nun sovaĝe.

**IFIGENIO.**

Ne la pastrino nun al vi parolas, Sed la filino de Agamemnono. De nekonata virgulin' la vorto Sanktecon por vi havis; nun subite Al la princino volas vi ordoni? Ho, ne! De la plej fruaj miaj jaroj Mi lernis obeadon, en komenco Al la gepatroj, poste al diino, Kaj plej libera mi min ĉiam sentis En obeado; tamen submetiĝi Al kruda vorto kaj ordon' kruela De viro—tion mi neniam lernis.

**TOAS.**

Ne mi—malnova leĝ' al vi ordonas.

**IFIGENIO.**

Avide ni alligas nin al leĝo, Se la pasion nian ĝi favoras. Al mi alia, pli malnova leĝo Parolas kaj ordonas kontraŭstari: 92 La leĝo, kiu diras, ke fremdulo Por ĉiu homo devas esti sankta.

**TOAS.**

Videble la kaptitoj por vi estas Tre karaj; ĉar de granda ekscitiĝo Vi la plej ĉefan vorton de l' saĝeco Forgesas, kiu diras: ne incitu La potenculon!

**IFIGENIO.**

Sed ĉu mi parolas, Ĉu mi silentas, vi ja scias, kio En mia koro estas nun kaj ĉiam. Ĉu rememoro pri egala sorto Ne naskas la kompaton en la koro? Kaj tiom pli en mia kor'! En ili Min mem mi vidas. Antaŭ la altaro Mi mem ja tremis, kaj la frua morto Solene min ĉirkaŭis genuantan; Jam la tranĉil' ekbrilis, por trabori La bruston, plenan de bolanta vivo, Teruro trafenetris mian koron, Mi fermis la okulojn, kaj—mirakle Mi trovis savon. Se al ni la dioj Favore sendis savon kontraŭ morto, Ĉu ĝi ne estas nia sankta devo Repagi tion al malfeliĉuloj? Vi tion scias, vi min konas, tamen Vi volas nun perforte min devigi!

**TOAS.**

Obeu la oficon, ne la reĝon!

93

**IFIGENIO.**

Ha, ĉesu! ne beligu la perforton, Ĝojantan de virina malforteco! Libera mi naskiĝis, kiel viro. Se nun la filo de Agamemnono Troviĝus antaŭ vi kaj vi altrudus Al li postulon, kiun vi ne devas: Li ankaŭ havas glavon, havas brakon, Por siajn rajtojn antaŭ vi defendi. Sed mi nenion havas krom la vortoj, Kaj nobla viro devas dece ŝati La vorton de virino.

**TOAS.**

Mi ĝin ŝatas Pli, ol mi ŝatus glavon de la frato.

**IFIGENIO.**

Ŝanĝiĝas la sukces' en la batalo; Ne taksu malamikon tro malforta. Eĉ malfortulon la natur' ne lasis Sen helpo kontraŭ pugno de fortulo. Ĝi al li donis ruzon, artifikaĵojn; Li cedas, li prokrastas, ĉirkaŭiras. Jes, la fortul' meritas la ruzaĵojn.



**TOAS.**

Ruzaĵon neniigas singardeco.

**IFIGENIO.**

Animo pura ruzon ne bezonas.

94

**TOAS.**

Vin mem vi nesingarde ja kondamnas!

**IFIGENIO.**

Ho, se vi vidus, kiel la animoEn mi batalas forte, por rebatiMalbonan tenton tuj en la komenco!Do sendefenda antaŭ vi mi staras?La belan peton, tiun ĉarman branĉon,En mano de virino pli potenconOl glavo kaj ol lanco, vi forpuŝas?Per kio do mi povas min defendi?Ĉu mi miraklon petu de l' diino?Ĉu en mi mem jam forto ne ekzistas?

**TOAS.**

Mi vidas, ke la sorto de l' fremdulojVin tre maltrankviligas. Kiuj estasLa viroj, kiuj tiom vin zorgigas?

**IFIGENIO.**

La viroj—ili estas—mi supozas,Ke ili estas grekoj.

**TOAS.**

Samlandanoj?Kaj certe ja en vi ili revekisLa belan bildon de reveno hejmen?

**IFIGENIO (post mallonga silento).**

Ĉu por kuraĝa, ne aŭdita faroLa rajton havas sole nur la viro?<sup>95</sup>Ĉu neblaĵon sole li alpremasAl sia forta kaj heroa brusto?Sed kion oni nomas granda?KioKun ekscitado levas la animonDe ĉiam ripetanta rakontanto,Se ne la faro, kiu preskaŭ tuteSukceson ne promesas, kiun tamenKuraĝa homo brave entreprenas?Ĉu tiu, kiu sola en la noktoPenetras en tendaron malamikanKaj kiel flamo ne antaŭviditaAtakas furioze la dormantojnKaj vekiĝantojn, fine, atakitaDe l' leviĝintoj, tamen forrapidasKun multo da akiro,—ĉu li solaMeritas gloron? Ĉu nur tiu, kiuLa vojon sendanĝeran malŝatante,Kuraĝe pasas montojn kaj arbarojn,Por landon liberigi de rabistoj?Por ni nenio restas? Ĉu virinoNaturan sian rajton devas perdi?Sovaĝa esti kontraŭ sovaĝuloj,La rajton de la glav' de vi forrabiLaŭ maniero de amazoninojKaj la premadon venĝi nur per sango?En mia brusto ondas malkvieteKuraĝa entrepreno: mi konscias,Ke

mi riproĉon grandan ne evitos, Nek malfeliĉon, se ĝi ne sukcesos; Sed mi al vi transdonas mian sorton, Ho, dioj! Se vi amas la justecon, Kiel pri vi glorante oni diras,<sup>96</sup> Ho, tiam montru ĝin per via helpo Kaj nun per mi la veron vi honoru! Jes, sciu, reĝo, estas preparata Sekreta trompo. Vane vi demandas Pri la kaptitoj; ili estas for Kaj jam atingas la amikojn, kiuj Ĉe l' bordo ilin kun la ŝip' atendas. La pli maljuna, kiun la malsano Ĉi tie kaptis kaj nun jam forlasis,—Li estas—jes—Oresto, mia frato; La dua estas lia konfidato, Amiko lia de l' plej junaj jaroj, Pilado. Ilin sendis Apolono El Delfoj al ĉi tiu nia bordo, Kun la ordon' la bildon de Diano Forrabi kaj venigi la fratinon Al li, kaj rekompence por ĉi tio Al la persekutato de l' furioj, Al la kulpulo pri patrina sango La liberiĝon li promesis doni. Nin ambaŭ, kiuj tute solaj restas El la Tantala domo, mi nun metis En viajn manojn: pereigu nin, Se via konscienco ĝin permesas!

**TOAS.**

Vi pensas, ke la skito la barbara Aŭskultos tiun voĉon de la vero Kaj de l' homeco, kiun ne aŭskultis La grek' Atreo?

97

**IFIGENIO.**

Ĝin aŭskultas ĉiu, Sub kiu ajn ĉielo li naskiĝis, Se nur la fonto de la vivo pure Tra lia brusto fluas.—Kion, reĝo, Vi nun por ni silente en la koro Preparas? Se ĝi estas pereigo, Ho, tiam min mortigu la unuan! Ĉar nune, kiam plu neniam savo Por ni jam restas, nun mi plene sentas La tutan terurecon de l' danĝero, En kiun mi per miaj propraj manoj Nun ĵetis miajn karajn. Ve, ho ve! Mi vidos ilin antaŭ mi ligitajn! Kun kia koro diros mi adiaŭ Al mia frato, kiun mi mortigas? Neniam en okulojn la amatajn Mi povos plu rigardi!

**TOAS.**

Do tiele Per arta elpensado la trompisto Elteksis reton ĉirkaŭ via kapo Al vi, la longatempe izolita! El tio, kion via kor' deziris, Facile ili faris por vi kredon!

**IFIGENIO.**

Ne, reĝo, ne! Min trompi oni povus, Sed tiuj estas veraj kaj fidelaj. Se la esplor' alie al vi montros, Vi tiam povas ilin pereigi,<sup>98</sup> Vi tiam min forpuŝu kaj pro puno Por mia malsaĝeco min forpelu Al la malgaja kaj senhoma bordo De rifa kaj sovaĝa insuleto! Sed se montriĝos, ke la viro estas La kara kaj amata mia frato, Ho, tiam lasu nin libere iri, Kaj kiel antaŭ nun por la fratino, Vi nun por la gefratoj estu bona! La patro mia mortis de l' edzino, Kaj ŝi de l' filo. Lasta la espero De la Atrea gent' sur li teniĝas. Permesu do, ke mi kun pura koro Kaj

pura mano iru al la hejmo, Por tie nian domon senpekigi! Plenumu vian vorton!  
Vi promesis, Ke se mi iam havos la eblecon Reiri al la miaj, vi min lasos: Nun la  
ebleco venis. Reĝa vorto Ne estas kiel vorto de simpluloj: Li ne promesas nur  
por embarase Momente liberiĝi de l' petanto, Li ankaŭ ne promesas, se li  
kredas, Ke la plenum' neniam povas veni. Nur tiam li eksentas la altecon De la  
valoro sia, se li povas Feliĉon doni al la atendantto.

**TOAS.**

Simile kiel fajro kontraŭ akvo Batale sin defendas kaj muĝante Ekstermi penas  
sian malamikon, 99 Tiele nun batalas la kolero En mia brusto kontraŭ viaj vortoj.

**IFIGENIO.**

Ho, lasu do, ke via favorkoro, Simila al la sankta oferflamo, Por mi ekbrilu,  
dolĉe ĉirkaŭata De danko kaj de beno kaj de ĝojo!

**TOAS.**

Ho, dioj, kiel ofte tiu voĉo Min kvietigis!

**IFIGENIO.**

Donu vian manon, Ĝi estu por mi signo de la paco!

**TOAS.**

Tro multe vi postulas tro rapide.

**IFIGENIO.**

Bonfaroj ne bezonas pripensadon.

**TOAS.**

Tre multe! Ĉar tre ofte post la bono Ja sekvas la malbono.

**IFIGENIO.**

Nur la dubo Malbonon povas fari el la bono. Ne dubu, sed plenumu mian  
peton Libere, kiel diktas via sento!

SCENO KVARA.

ORESTO (armita). LA SAMAJ.

**ORESTO** (*turnita al la scenejo*).

Duoble streĉu ĉiujn viajn fortojn, Rebatu ilin, restas nur momento! Ne cedu, kovru vojon al la ŝipo Por mi kaj la fratino! Venu tuj! (Al Ifigenio, ne vidante la reĝon.) Ni estas perfiditaj. Tre malmulte Da tempo ni disponas por la kuro. Rapidu! (Li ekvidas la reĝon.)

**TOAS** (*kaptante la glavon*).

Tie, kie mi alestas, Neniu povas teni nepunate La glavon nudigitan!

**IFIGENIO**.

Ne profanu Per furiozo kaj per mortigado La templon de l' diin'. Al la amaso Ordonu stari pace kaj aŭskultu Pastrinon kaj fratinon!

**ORESTO**.

Diru, kiu Li estas, tiu, kiu nin minacas?

**IFIGENIO**.

Respektu en li reĝon, kiu estis Por mi la dua patro! Ne koleru Min, frato! La infana mia koro Konfide metis nian tutan sorton En lian manon. Vian entreprenon Konfesis mi al li kaj mi tiele Animon mian savis de perfido.

**ORESTO**.

Ĉu pace li permesas forveturon?

**IFIGENIO**.

Min silentigas via nuda glavo.

**ORESTO** (*enigante la glavon en la ingon*).

Parolu! mi obeas viajn vortojn.

SCENO KVINA.

LA SAMAJ. PILADO kaj tuj post li  
ARKAS (ambaŭ kun nudigitaj glavoj).

**PILADO**.

Ne perdu tempon! Jam la lastajn fortojn La niaj nun kolektis;  
repaŝante, Cedante malrapide, ili estas Premataj en direkto al la maro. Sed kian paroladon inter princoj Mi vidas! Tio estas ja sendube La respektata kapo de la reĝo!

**ARKAS.**

Kviete, kiel ĝi al vi konvenas, Vi, reĝo, staras kontraŭ malamikoj. La aroganta entrepreno estos Punita baldaŭ. La anar' ilia<sup>102</sup> Falante cedas; jam la ŝipo estas En niaj manoj. Vi nur vorton diru, Kaj tuta ĝi en fajro staros.

**TOAS.**

Iru, Al la popol' ordonu trankviliĝi! Neniu tuŝu nun la malamikojn, Dum ni parolas! (Arkaso foriras.)

**ORESTO.**

Mi akceptas. Iru, Amiko mia kara, kaj kolektu La reston de l' anaro! kaj silente Atendu, ĝis ni vidos, kian finon Al niaj faroj la ĉiel' preparis! (Pilado foriras.)

SCENO SESA.

IFIGENIO. TOAS. ORESTO.

**IFIGENIO.**

Mi tremas. Antaŭ ol komencas vi paroli, Mi petas, liberigu min de zorgoj! Mi timas malfeliĉon, se vi, reĝo, La voĉon de l' justeco ne aŭskultos, Aŭ vi, ho mia frato, ne retenos La rapideman flamon de l' juneco.

**TOAS.**

Mi, kiel pli maljuna, estas preta Reteni la koleron. Diru, kiel Vi pruvos, ke vi vere estas filo<sup>103</sup> De l' reĝ' Agamemnono kaj la frato De ŝi?

**ORESTO.**

Jen, vidu, estas tiu glavo, Per kiu li batalis kun Trojanoj. De lia mortiginto mi ĝin prenis Kaj mi la diojn petis, ili donu Al mi la kuraĝecon kaj la brakon Kaj la feliĉon de la granda reĝo, Sed nur pli belan morton. Nun elektu El viaj militistoj la plej noblan Kaj lin batale kontraŭ mi starigu! Nenie sur la tero al fremdulo Tiela peto estas rifuzata.

**TOAS.**

Ĉe ni antikva moro al fremdulo Neniam donis tiun rajton.

**ORESTO.**

Sekve De vi kaj mi la moro komenciĝu! Per imitado tuta la popolo La noblan agon de l' reganto baldaŭ Sanktigos kiel leĝon. Mi batalu Ne sole por ni

mem,—sed mi, fremdulo,Batalu por la rajtoj de fremduloj!Se mi pereos, tiam  
decidiĝosKun mia sorto ankaŭ sort' ilia;Sed se mi havos la feliĉon  
venki,Neniam paŝu sur ĉi tiun bordonFremdulo, kiun ne renkontos  
tuj<sup>104</sup>Rigardo de la plej helpema amo,Kaj ĉiu forŝipiĝu konsolita!

**TOAS.**

Vi al mi ŝajnas inda, ho, junulo,La patrojn, kiujn vi la viaj nomas.Tre multe da  
kuraĝaj, noblaj virojMin akompanas; sed en mia aĝoMi mem ankoraŭ kontraŭ  
malamikoVolonte staras, kaj mi estas pretaKun vi la sorton provi de l' batalo.

**IFIGENIO.**

Ho ne, ho ne! Tielan sangan pruvonLa dioj ne permesos! Prenu forDe l' glavo  
vian manon! Pensu, reĝo,Pri mi kaj mia sorto! La bataloRapide decidita  
eternigasLa viron; se eĉ falas li, la kantoLin gloras. Tamen la senfinaj  
larmojDe la restintoj, do virin' amata,Ne estas kalkulataj; la poetoSilentas pri la  
miloj de la tagojKaj de la noktoj, kiam orfigitaAnimo vane vokas la  
perditon,Silente konsumiĝas, sopirante.Min mem avertis tuj en la komencoLa  
zorgo, ke min trompo de rabistoNe ŝtelu for el mia rifuĝejoKaj ne fordonu min  
al la sklaveco.Kaj diligente faris mi demandojn,Pri ĉio plej detale  
informiĝis<sup>105</sup>Postulis signojn, kaj nun mia koroJam estas tute certa. Vidu  
tieSur lia dekstra mano la makulonTristelan, kiu tuj post la naskiĝoĈe li aperis  
kaj pri kiu dirisLa pastro, ke ĝi estas antaŭsignoDe peza faro, kiun por la  
manoRezervis la destino. Kaj duobleKonvinka por mi estas la cikatroĈi tie,  
ĝuste super lia brovo.Ankoraŭ kiam estis li infano,Elektro iam per  
nesingardecōFaligis lin; li trafis tripiedonKaj vundis brovon.—Jes, ĝi estas  
li!Kaj ĉu la simileco al la patro,Ĉu la interna ĝoj' de mia koroNe estas  
certigantaj atestantoj?

**TOAS.**

Kaj se eĉ viaj vortoj ĉiun dubonEn mi forigus, kaj eĉ se mi bridusEn mia brusto  
tutan la koleron,Ni tamen devus inter ni decidiPer bataliloj: pacon mi ne  
vidas.Ĉar ili venis,—vi ĝin mem konfesas,Por rabi for la bildon de l' diino;Ĉu  
mi trankvile tion ĉi toleru?La greko ofte ĵetas avidegeOkulon al trezoroj  
malproksimajDe la barbaroj, al la ora felo,Aŭ al ĉevaloj, al filinoj belaj;Ne ĉiam  
tamen ruzo kaj perforto<sup>106</sup>Kun malhoneste akirita havoFeliĉe ilin hejmen  
revenigis.

**ORESTO.**

La bild', ho reĝo, nin ne malpacigu!Nun jam klariĝis la eraro, kiunLa dio metis  
ĉirkaŭ nian kapon,Simile al vualo, kiam liDeziris, ke ĉi tien ni vojaĝu.Mi petis,

ke li donu al mi helpon, Por liberiĝi de l' furioj; tiam La dio diris: „Kiam la fratinon, Restantan kontraŭvole en la templo De l' malproksima bordo de Taŭrido, Vi revenigos en la grekan landon, Vi tiam liberiĝos de l' malbeno.“ Ni pensis, ke la vortoj de la dio Koncernas la fratinon de li mem, Li tamen pensis vin! La fortaj ĉenoj Nun falis; vi, senkulpa virgulino, Denove apartenas al la viaj. Vi min ektuŝis, kaj mi resaniĝis; En viaj brakoj min la lastan fojon Atakis la malsano plej kruele Kaj plej terure skuis mian cerbon; Sed tuj, kiel serpento en kavernon, Ĝi fulme malaperis. Kaj per vi Mi ĝuas nun denove plej libere La lumon de la tago. La decido De la diino nun al mi montriĝas En plena brilo. Kiel sanktan bildon, Al kiu per mistera dia vorto<sup>107</sup> La sorto de la urbo alligiĝis, Ŝi vin forprenis, la protektantinon De nia domo, kaj ŝi vin konservis En sia sankta kaj silenta loko, Ke vi fariĝu beno por la frato Kaj por la viaj. Kiam ĉia savo Jam ŝajnis senespere forperdita, Vi ĉion nun al ni redonas. Reĝo! Direktu vian koron al la paco! Vi ne malhelpu, ke ŝi resanktigu La patran domon, ke ŝi min redonu Al la palaco pente purigita Kaj kronu min per la antikva krono! Redonu por la beno, kiun ŝi Al vi alportis; rajton pli proksiman Al ŝia frato nun permesu ĝui! La forton kaj la ruzon, de la viroj Plej grandan gloron, kovras nun per honto La vero de ĉi tiu alta koro, Kaj pura kaj infana konfideco Al nobla vir' ricevas rekompencan.

#### **IFIGENIO.**

Memoru vian vorton! La parolo El la sincera kaj fidela buŝo Vin tuŝu! Nin rigardu! La okazo Por tia nobla far' ne ofte venas. Vi ne rifuzos; cedu!

#### **TOAS.**

Bone, iru!

108

#### **IFIGENIO.**

Ne tiel, mia reĝ'! Sen via beno Kaj kontraŭ via volo mi ne iros. Nin ne forpelu! Ĉarma kora rajto De reciproka gastameco ligu Nin ambaŭ: kaj tiele ne por ĉiam Ni estos disigitaj. Tiel same Profunde, kiel mian propran patron, Mi amas vin per mia tuta koro, Kaj tiu sento restos por eterne. Se iam eĉ la plej malgrava homo El via gento al orelo mia Alportos sonon de la lingvo, kiun El via buŝo aŭdi mi kutimis, Kaj sur la plej malriĉa mi rimarkos La karan formon de la vesto via: Mi tiam lin akceptos kiel dion, Mi mem al li pretigos la kuŝejon, Sidigos lin sur seĝo ĉe la fajro, Demandos nur pri vi kaj via sorto. La dioj al vi donu rekompencan Por viaj faroj, via bonkoreco! Adiaŭ! Turnu vin al ni kaj donu Al mi elkoran vorton de disiĝo! Ho, tiam pli kviete al la veloj La vento

blovos, kaj pli trankviligeEl la okuloj de la forirantoSilentaj larmoj fluos. Ho,  
adiaŭ!Por signo de antaŭa amikecoLa dekstran manon vi al mi etendu!

**TOAS.**

Adiaŭ!

**Fino.**

# Verkaro de D<sup>ro</sup> L. L. ZAMENHOF

*Ĉiu Esperantisto devas nepre posedi la verkojn de nia Majstro!*

## INSTRUA FAKO

### Fundamento de Esperanto:

Eldono Franca, Angla, Germana, Rusa, Pola ( <i>bindita</i> )		Fr. 3 »
(La sama, <i>broŝurita</i> )		— 2 »
Oni vendas aparte	Ekzercaro (kvinlingva), <i>broŝurita</i>	— » 75
	Universala Vortaro (kvinlingva), <i>broŝurita</i>	— 1 »
Eldono	Hispana	— 1 »
—	Itala, tradukita de S <sup>ino</sup> ROSA JUNCK	— 1 »
—	Greka, — S <sup>o</sup> KONSTANTINO KULURI	— 1 »



— **Slovaka**, — D<sup>o</sup> A. ŠKARVAN kaj S<sup>o</sup> EVSTIFEIEFF Kr. 1 »

— **Hungara**, tradukata de S<sup>ro</sup> B<sup>no</sup> LADISLAO D'ORCZY » »

— **Rumana**, tradukata de la »Societatea Esperantista Rumana » » »

**örterbuch Deutsch-Esperanto.** Dua eldono, revidita, korektita, pliigita! Ĝi estas la vera komplemento de **Universala Vortaro**.

Unu volumo, in-16, 178-paĝa (*broŝurita*)

M. 2 »  
Fr. 2,5  
0

**tschenwörterbuch Deutsch-Esperanto und Esperanto-Deutsch.** Tre utila poŝa vortaro.

Unu volumo in-16, 137-paĝa (*broŝurita*)

M. 1 »  
Fr. 1,5  
0

#### LITERATURA FAKO

**ndamenta Krestomatio**, plej grava verko, kiun ĉiu devas legi por akiri perfektan stilon.

Unu volumo, in-16, 460-paĝa (*broŝurita*)

Fr. 3,50

**amleto**, tragedio en kvin aktoj, trad. el SHAKESPEARE.

Unu volumo, in-16, 170-paĝa (*broŝurita*)

Fr. 2 »

**Revizoro**, komedio en kvin aktoj, trad. el N. V. GOGOL.

Unu volumo, in-8, 100-paĝa (*broŝurita*)

Fr. 1,50

**Predikanto**, trad. el «La Biblio».

Unu volumo in-8. 28-paĝa (*broŝurita*)

Fr. 0,75

**Psalmaro**, libre trad. el «La Biblio».

Unu volumo in-8 (en preparo)

— » »

**Rabistoj**, dramo en kvin aktoj, trad. el SCHILLER.

Unu volumo in-8, 144-paĝa (*broŝurita*).

Fr. 2 »

**La virineto de maro**, fabelo, trad. el ANDERSEN, kun ilustraĵoj de HILDA MAY BRODIE,  
(Eltirita el la Fundamenta Krestomatio.)

Unu volumo in-8, 42-paĝa (*broŝurita*)

Fr. 1,50

# LA REVUO

Internacia monata literatura gazeto  
EN ESPERANTO

La **sola**, kiu estas honorata per la konstanta kunlaborado  
DE

D<sup>ro</sup> L. L. ZAMENHOF  
Aŭtoro de la lingvo Esperanto

Plej bonstila, zorge revidita, bele presita, akurate eldonata, **La Revuo** publikigas  
novelojn, teatraĵojn, romanojn, poeziojn, seriozajn studojn pri popolmoroj, historio,  
geografio, k. c. Ĉiu numero enhavas bibliografian parton, tutmondan kronikon kaj tre  
interesan felietonon.

**Ĉiu numero havas 48 paĝojn da plej bona teksto!**

**Specimenoj estas senpage senditaj. Konkursoj estas organizitaj.**

## ONI ABONAS:

<b>Francujo.</b> —Librejo HACHETTE KAJ K <sup>o</sup> , 79, boulevard Saint-Germain <i>PARIS</i> , unu numero 50 cent., jara abono	Fr. 6
<b>Danujo.</b> —ANDR.-FRED. HÖST & SÖN, Bredgade, 35, KJÖBENHAVN, unu numero 50 öre, jara abono	Kr. 4,50
<b>Germanujo kaj Aŭstrujo-Hungarujo.</b> —ESPERANTO-VERLAG MÖLLER & BOREL, Prinzenstr. 95, <i>BERLIN</i> , unu numero 45 pfen., jara abono	M. 5
<b>Britanda Britujo kaj Kolonioj.</b> —THE BRITISH ESPERANTO ASOCIO, Museum station Building, 133-6, High Holborn, <i>LONDON W. C.</i> , unu numero 6 penc., jara abono	S. 6
<b>Hispanujo.</b> —J. ESPASA, 579, calle de las Cortes, <i>BARCELONA</i> , jara abono	P. 8
<b>Italujo.</b> —R. GIUSTI, 53, Via Vittorio Emanuele, <i>LIVORNO</i> , unu numero 50 cent., jara abono	L. 7
<b>Rumanujo.</b> —Libraria noua CAROL P. SEGAL, Calea Victoriei, 77, <i>BUCURESTI</i> , unu numero 60 banoj, jara abono	Leoj. 7

<b>pluvo.</b> —M. ARCT, 53, Nowy Swiat, <i>WARSZAWA</i> , unu numero 25 kopekoj, jara abono	R. 2,80
<b>nuigitaj Ŝtatoj.</b> —FLEMING H. REVELL COMPANY, 158, Fifth Avenue, <i>NEW-YORK</i> , unu numero 10 cend, jara abono	D. 1,40
<b>vedujo kaj Finnlando.</b> —P. AHLBERG, 27, Surbrunnsgatan, <i>STOCKHOLM</i> , unu numero 50 öre, jara abono	Kr. 4,50
<b>por la landoj, kie ne estas abonejo</b> , sin turni al la firmo HACHETTE & K <sup>o</sup> en <i>PARIS</i> ; jara abono (por tiuj landoj)	Fr. 7

*Oni akceptas pagon de l' abono nur per poŝtmandato aŭ ĉeko.*

## Kolekto de «La Revuo»

### INSTRUA FAKO

**grammaire complète d'Esperanto**, de CAMILLE AYMONIER, profesoro ĉe la liceo «Charlemagne».

La sola vere plena gramatiko, laŭ plej scienca kaj logika plano. Ĝi estas kaj estos la **modelo** de l' gramatikoj. Speciale taŭgas por **superaj kursoj**. Eĉ nefrancoj havos grandan utilon de ĝia lernado.

Unu volumo in-16, 166-paĝa (*broŝurita*) Fr. 1,50

**esperanta Sintakso**, laŭ verkoj de D<sup>o</sup> ZAMENHOF kaj aliaj aŭtoroj. En Esperanto verkita de PAUL FRUICTIER.

Unu volumo in-16, 75-paĝa (*broŝurita*) Fr. 1,50

**konkordanco de la vortoj de Ekzercaro**. Ellaborita de ALFRED E. WACKRILL.

Unu volumo in-16, 95-paĝa (*broŝurita*) Fr. 1 »

**razaro**, en Esperanto, de H. de COPPET.

Unu volumo in-16 (en preparo) — » »

### LITERATURA FAKO

**lingva lingvo sen profesoro**, unuakta komedio de TRISTAN BERNARD, tradukita de GASTON MOCH.

Unu volumo in-8, 44-paĝa (*broŝurita*) Fr. 1 »

**likedo**, artikoloj pri literaturaj kaj beletristikaj demandoj, de CH. LAMBERT.

Unu volumo in-8, 157-paĝa — » »

**renlago**, novelo de THEODOR STORM, tradukita el la germana lingvo de ALFRED BADER.

Unu volumo in-8, 33-paĝa ( <i>broŝurita</i> )	Fr.	»	75
<b>libro de l' Humoraĵo</b> , originale verkita de PAUL DE LENGYEL.			
Unu volumo in-8, 194-paĝa	Fr.		2,50
<b>Faraono</b> , romano de PRUS, tradukita el la pola lingvo de D <sup>o</sup> BEIN.			
Unua volumo, in-8, 194-paĝa ( <i>broŝurita</i> )	Fr.	2	»
Dua volumo, in-8, 238-paĝa ( <i>broŝurita</i> )	—	2	»
Tria volumo, in-8, 197-paĝa ( <i>broŝurita</i> )	—	2	»
<b>Rompantoj</b> , kvin monologoj kun ilustraĵoj. Originale verkitaj de FREDERIKO PUJŬLA-VALJES.			
Unu volumo in-8, 40-paĝa ( <i>broŝurita</i> )	Fr.	1	»
<b>akbeto</b> , dramo en 5 aktoj de SHAKESPEARE, tradukita de D <sup>r</sup> H. LAMBERT.			
Unu volumo in-8, 125-paĝa	—	»	»

## Teknika Kolekto

**anatomia vortaro** (en latina, franca, angla kaj esperanta lingvoj) verkita de la MEDICINA ESPERANTISTA GRUPO.

Unu volumo in-8	Fr.		1,50
<b>komercaj leteroj</b> , en Esperanto, kun vortareto kvarlingva, de P. BERTHELOT kaj CH. LAMBERT.			
Unu volumo in-16	Fr.	»	50
<b>Komerca Sekretario</b> , de Ros. SUDRIA.			
Unu volumo in-16	Fr.	»	50
<b>atematika terminaro kaj krestomatio</b> , de R. BRICARD.			
Unu volumo in-16	Fr.	»	75
<b>onadologio</b> , de Leibniz, tradukis E. BOIRAC.			
Unu volumo in-16	Fr.	»	60
<b>uzika Terminaro</b> , de F. de Mènil.			
Unu volumo in-16 (en preparo)	—	»	»
<b>aktikaj komercaj leteroj</b> (en esperanta kaj franca lingvoj) de J. C. O'CONNOR, PH. DR. M. A., kaj D. P. HUGON.			
Unu volumo in-16	Fr.	»	90

- Novo de Marista Terminaro**, verkita sub la direkto de M. ROLLET de L'ISLE.  
Unu volumo in-8 (*bindita*) Fr. 1,50
- Vocabulaire des mots spéciaux à la philatélie** avec modèles de lettres (en Français et Esperanto), par R. LEMAIRE.  
Unu volumo in-8 Fr. » 40
- Vocabulaire technique et technologique Français-Esperanto**, par Charles VERAX.  
Unu volumo in-8 (*bindita*) Fr. 2,50

# 1907 Tutmonda Jarlibro Esperantista

ENHAVANTA LA  
Adresaron de D<sup>ro</sup> ZAMENHOF

Ĉi tiu jarlibro aperis dum la Kongreso. Ĝi entenas: pli ol 20.000 adresojn de Esperantistoj de ĉi tuta mondo, plenan sciigon pri la propagandaj societoj, la gazetoj en Esperanto, k. t. p.  
Unu volumo, in-16, broŝurita 3 Fr. 50

## La aldono 1908 aperos en Julio.

\*\*\* END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK IFIGENIO EN TAŬRIDO \*\*\*

Updated editions will replace the previous one—the old editions will be renamed.

Creating the works from print editions not protected by U.S. copyright law means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg™ electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG™ concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for an eBook, except by following the terms of the trademark license, including paying royalties for use of the Project Gutenberg trademark. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the trademark license is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. Project Gutenberg eBooks may be modified and printed and given away—you may do practically ANYTHING in the United States with eBooks not protected by U.S. copyright law. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

START: FULL LICENSE